



AKTOJ de la AKADEMIO
1963-1967

Akademio de Esperanto

Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto – N° 9

AKTOJ de la AKADEMIO

1963 - 1967

2-a eldono

Akademio de Esperanto

Rotterdam 2007

Ĉi tio estas reeldono de la *Aktoj de la Akademio 1963-1967*, unue publikigitaj en la jaro 1967-a kaj tiam presitaj en Nederlando (ĉe “Zwagers, Rotterdam”).

Ni skanis la presitan kajeron, kaj prilaboris la skanaĵon komputile por krei tiun ĉi novan eldonon. Ni provis kiom eble fidele redoni la tipografion de la antaŭa eldono, sed la paĝodivido estas tamen alia en tiu ĉi nova eldono. Malgravajn prezerarojn ni korektis senkomente.

Ni ŝuldas dankon al multaj personoj, kiuj helpis pri tiu ĉi reeldono. Mi menciuj nur kelkajn:

- Michela Lipari, kiu faris la bazan laboron por transformi la tekston en komputilan formon;
- Andreas Kück kaj Marc Bavant, kiuj kontrollegis la dokumenton kompare kun la originalo;
- Bertilo Wennergren, kiu ankaŭ kontrollegis, kaj kiu aranĝis la tipografion de la nova eldono.

Pri eventuale restantaj eraroj respondecas nur mi, Renato Corsetti, kiu, kiel sekretario de la Akademio de Esperanto, kunordigis la laboron.

Presita en Roterdamo 2007.

ISBN 978-90-811870-1-5

ANTAŬPAROLO

Jam de la komenco de la historio de niaj Lingvaj Institucioj la publiko plendis, ke ili nenion faras, kaj jam Zamenhof respondis al la tiamaj kritikantoj: “Oni forgesas, ke Komitato, kies membroj loĝas en malsamaj urboj kaj el kiuj ĉiu havas siajn proprajn profesiajn okupojn, ne povas multe fari.” (Leteroj, II, p. 108). Tiuj konsideroj estas ĉiam validaj, kaj oni devas esti des pli danka al la personoj, kiuj dediĉas parton el sia vivo kaj el siaj fortoj al tia kolektiva laborado, kiu estas la propra funkcio de ĉiu akademio.

Antaŭ la unua kaj inter la du mondmilitoj la ĉefa aktiveco de la Lingvaj Institucioj estis la kompletigado de la vortaro: oni efektive tiam plej bezonis, ke kompetenta instanco fiksu la formon kaj difinu la sencon de la vortoj, pli-malpli internaciaj, kiujn postuladis la disvastiĝanta uzo de la lingvo en pli kaj pli diversajn mediojn. Ni simple memoru, ke al la 2.641 radikoj de la “Universala Vortaro” aldoniĝis 1.907 aliaj en sep “Oficialaj Aldonoj”. Sed ekde 1930 kaj precipe de 1934, jaro de ĝia dua eldono, la “Plena Vortaro”, kvankam ne oficiala, iom post iom pruviĝis la oportuna registrilo, referencilo kaj kribrilo de nia vorttrezoro. Tio klarigas, ke post la dua mondmilito la Akademio iel stagnis, ne plu sentante la saman instigon daŭrigi siajn leksikologiajn esplorojn kaj ankoraŭ ne difininte al si novajn studkampojn.

Jen kial, elektite prezidanto, mi intencis direkti la agadon de la Akademio al la pli delikataj demandoj de sintakso aŭ vortfarado, kiujn oni ĝis tiam nur heziteme aludis, sed kiuj kun la paso de la tempo kaj la kreskanta deziro al la unueco kaj perfekteco de nia lingvo fariĝis pli kaj pli urĝantaj. Mi havis la grandan ŝancon trovi en la larĝvida erudicio de niaj Vicprezidantoj, W. Collinson, P. Neergaard kaj A. Atanasov, en la fruktoriga iniciatemo de la Direktoroj de la tri bazaj Sekcioj, A. Albault, D. B. Gregor kaj R. Haferkorn, fine en la klera diligenteco de nia Sekretario R. Bernard, la helpadon necesan por plenumi mian intencon. Al ili, kaj ankaŭ al ĉiuj miaj kolegoj, de kiuj mi postulis eble tro oftajn oferojn de tempo kaj atento, sed sen kies konsiloj kaj kritikoj nenio solida povus esti starigita, mi ĉi tie prezentas mian tutkoran dankon.

La rezultojn de nia kolektiva laborado la publiko disponas en ĉi tiu broŝuro, kune kun kelkaj utilaj informoj pri nia Institucio. Mi esperas, ke tiu dokumento vekos ĝeneralan intereson, kio ebligas al ni ne tro malbaldaŭ eldoni alian bultenon, ekzemple pri la “Baza Radikaro”.

*La 31an de Decembro 1967,
La Prezidanto,
G. Waringhien.*

ADMINISTRACIA PARTO

MALLONGA HISTORIO DE LA LINGVAJ INSTITUCIOJ

* * *

Tiu historio dividiĝas en du periodoj, apartigitaj de la dua mondmilito.

Unua Periodo

Al la Unua Universala Kongreso de Bulonjo (1905) Zamenhof prezentis planon por la organizo de la movado: en ĝi, apud reganta “Centra Komitato” el 25 membroj, estis proponitaj i.a. unu 15-membra “Komitato de la Lingvo” kaj unu 25-membra “Komitato de Ekzamenistoj”. Sub la influo de Beaufront kaj Cart la Kongreso decidis starigi “Komitaton simple lingvan kun D-ro Zamenhof kiel prezidanto, por konsiliĝi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo”. Zamenhof, ne volante alpreni mem povon de elektado, proponis, ke eniru en tiun Komitaton la redaktoroj de la pli gravaj Esperantaj gazetoj, la prezidantoj de la pli gravaj societoj kaj la pli konataj esperantistoj: oni tiel atingis la nombron de 102 membroj el 26 nacioj, kaj Rektoro Boirac estis elektita kiel efektiva prezidanto.

En la Dua Universala Kongreso de Ĝenevo (1906) Zamenhof petis, ke la “Lingva Komitato” (L.K.), kiu estis elektita provizore nur por unu jaro, fariĝu definitiva komitato kaj la prezidanto Boirac konservu sian postenon. Tiu peto estis sankciita de la Kongreso.

Tiel grandnombra kaj disloka Komitato ne povis praktike labori; tio aparte evidentiĝis ĉe la Ido-krizo en 1908. Jen kial je tiu dato la Prezidanto proponis formi “Superan Komisionon aŭ Akademion” el maksimume 18 membroj, kun la sama Estraro kiel la L.K., kaj starigi kvar konstantajn komisionojn por la Komuna Vortaro, la Gramatiko, la Teknika Vortaro kaj la Internaj Aferoj. Fine li prezentis “Deklaron pri la rolo de la Lingva Komitato”, kiu komenciĝis jene: “La tasko de la L.K. estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la suprediritaj principoj. Neniel la Fundamento nek la L.K. povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili, kontraŭe, certigas.” Ĉiuj tiuj proponoj kaj la Deklaro estis aprobitaj de la Kvara Kongreso de Dreseno (1908).

Interne de la L.K. Boirac voĉdonigis “Regularon”, kiu ricevis kelkajn modifojn en 1912; la ĉefa punkto estis, ke “la anoj de la L.K. estas elektitaj de la L.K. mem, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, inter kandidatoj, kies liston preparas la Akademio” (Art. 4a). En 1935 la Prezidanto Rollet de Lisle voĉdonigis novan tekston, aranĝitan en “Statutaro” (tiele!) kaj “Interna Regularo”; la ĉefa novaĵo estis, ke la Akademio ne plu “eltiras el la proponitaj kandidatoj la esperantistojn, kiujn ĝi juĝas indaj fariĝi anoj de la L.K.”, sed ke ĝi limigas sin je la listigo de la kandidatoj, kiujn prezentas “la esperantistaj societoj, la anoj de la L.K., aŭ eĉ kiu ajn esperantisto, kiu ankaŭ rajtas prezenti sin mem”. Samtempe pro la kreskanta nombro de la L.K.-anoj (116) li decidigis limigi ilian nombron je cent.

Dum tiu unua periodo la Prezidantoj de la Lingvaj Institucioj estis sinsekve:

1905-1917 Emile Boirac (1851-1917), franca filozofa kaj rektoro de la Universitato de Dijono. Post lia morto kaj pro la unua mondmilito okazis interrompo en la funkciado de la Lingvaj Institucioj.

1920-1931 Théophile Cart (1855-1931), franca lingvisto, profesoro en la Lernejo de Politikaj Sciencoj en Parizo kaj, en la lastaj jaroj, prezidanto de la Pariza Societo de Lingvistiko.

1931-1933 John Mabon Warden (1856-1933), skota aktuario ĉe la vivasekura kompanio “Scottish Equitable“, membro de la Edinburga Instituto de Aktuarioj.

1933-1937 Maurice Rollet de Lisle (1859-1943), hidrografia ĝenerala inĝeniero de la franca maristaro, direktoro de la Centra Oficejo Hidrografia en Parizo.

1937-1939 Johannes R. C. Isbrucker (1889-1967), nederlanda inĝeniero pri elektrotekniko, vicdirektoro de meza teknika lernejo en Hago.

La Direktoroj de la Sekcioj estis:

a) por la Komuna Vortaro: Th. Cart (1908-1912); ĉe tiu dato Cart fariĝis “ĝenerala Direktoro por la Vortaro”, helpate de L. Elb, poste E. Grosjean-Maupin por la “komuna vortaro” kaj de Ch. Vérax por la “teknika”; ekde 1920, la situacio renormaliĝis kun la Direktoroj E. Grosjean-Maupin (1920-1934), L. Bastien (1934), W. Bailey (1935-1939).

b) por la Gramatiko: A. Grabowski (1908-1921), W. Lippmann (1924-1936), A. Cseh (1937-1940).

c) por la teknika vortaro: R. de Saussure (1912), kaj, post la komuna regado de Cart (vidu sub a), P. Corret (1920-1922), M. Rollet de Lisle (1922-1932), L. Bastien (1933-1936), L. Helleboid (1937-1939), ĉi lasta ne-L.K.-ano.

d) por jenaj, ne konstantaj sekcioj: pri Internaj Aferoj: G. Moch (1908-1911); pri Propraj Nomoj: G. Moch (1907-1910); pri Vortfarado: R. de Saussure (1911-1919); pri Elparolo kaj Premioj: E. Privat (1924-1927); pri Kontrolo: M. Rollet de Lisle (1931-1939).

La Supera Komisiono aŭ Akademio konsistis en 1908 el 12 membroj: Boirac, Bein, Cart, Ellis, Evstifejeff, Grabowski, Moch, Mybs, Nylén, de Saussure, Villanueva kaj Wackrill, reprezentantaj respektive la lingvojn francan (4), anglan, polan (po 2), germanan, hispanan, rusan kaj svedan (po 1). Post la interrompo de la unua mondmilito, ĝi konsistis el 15 membroj: Cart, Christaller, Corret, Evstifejeff, Grabowski, Grosjean-Maupin, Inglada, Kühnl, Lengyel, Mybs, Nylén, Privat, de Saussure, Wackrill, Warden, reprezentantaj respektive la lingvojn francan (5), anglan, germanan (po 2), ĉeĥan, hispanan, hungaran, polan, rusan kaj svedan (po 1). Fine en 1939 ĝi konsistis el 16 membroj: Baghy, Bailey, Bastien, Belmont, Cseh, Grau Casas, Inglada, Isbrucker, Lippmann, Minor, Nylén, Rollet de Lisle, Schmid, Setälä, Stamadiadis, Waringhien (kaj unu sekretario-kasisto ne-akademiano, R. de Lajarte), reprezentantaj respektive la lingvojn francan, germanan (po 3), hungaran (2), anglan, finnan, grekan, hispanan, katalunan, nederlandan, polan kaj svedan (po 1).

Propraj verkoj de la Akademio, oficiale agnoskitaj de la L.K., estas nur:

I°. La 6 Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro: la *Unua*, preparita de Cart, voĉdonita en 1909 kaj entenanta 864 radikojn kun tradukoj en la franca, angla, germana, rusa kaj pola; la *Dua*, preparata de Grosjean-Maupin sub la nomo de Cart, voĉdonita en 1919 kaj dividita en du partoj: a) Internaciaj vortoj, sen tradukoj sed kun montrado de la gramatika kategorio: 480 radikoj; b) Komune uzataj vortoj: 111 radikoj kaj 2 kunmetaĵoj, kun tradukoj en la franca, angla kaj germana – sume 591 radikoj, plus la sufikso **-ism**; la *Tria*, preparata de Grosjean-Maupin, voĉdonita en 1921 kaj same dividita: a) propre esperantlingvaj radikoj: 61; b) internaciaj radikoj: 131 – sume 192, ĉiuj kun tradukoj en la angla, franca, germana, hispana, portugala, itala kaj pola; la *Kvara*, preparata de Grosjean-Maupin, voĉdonita en 1929 kaj entenanta nur unu liston el 118 radikoj, kun la tradukoj en la franca, angla kaj germana, plus la prefikso **mis-**; la *Kvina*, preparata de Bastien, voĉdonita en 1934 kaj prezentanta du listojn: a) oficialaj vortradikoj: 5; b) teknikaj vortradikoj: 3 – sume 8, ĉiuj kun tradukoj en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj pola; la *Sesa*, preparata de Bailey, voĉdonita en 1935 en du listoj: a) oficialaj vortradikoj: 15; b) teknikaj vortradikoj: 6 – sume 21 kun tradukoj en la samaj ses lingvoj.

II°. La kvin partoj de la “Korektoj pri eraraj tradukoj en la Universala Vortaro”, voĉdonitaj en 1922-1923. La tekston oni trovas en la modele scienca eldono de la “Fundamento”, kompilita en 1963 de D-ro A. Albault.

Ĉiuj aliaj verkoj, ĉu ili aperis en la “Kolekto de la Akademio”, ĉu aliloke, estis nur privataj verkoj de apartaj akademianoj aŭ L.K.-anoj: la “Oficiala Klasika Libro de Esperanto” de Grosjean-Maupin ne estas tiurilate pli oficiala, ol la “Oficiala Radikaro” de E. Wüster; aparte erariga estas la titolo de la libro, kompilita de S. Grenkamp: “Oficiala Vortaro de Esperanto”, kontraŭ kiu la L.K. mem avertis en 1937.

La tuta laborado de la Lingvaj Institucioj ĝis 1922 estis ebligita kaj pagita de la “Centra Oficejo”, t.e. ĉefe el la malavaraj donacoj de Generalo Sebert: en ties “Oficiala Gazeto” aperis la jaraj raportoj, la raportoj de la Sekcioj aŭ Komisionoj ktp. Post la morto de Sebert, la L.K. suferis je manko de rimedoj por eldono aŭ eĉ funkciado, kaj la situacio pliboniĝis nur post la starigo de la “Internacia Centra Komitato” (I.C.K.), fariĝinta en 1936 la “Internacia Esperantista Ligo” (I.E.L.), kiu ĉiujare difinis subvencion, al kiu aldoniĝis kelkaj maloftaj donacoj de privatuloj: tio ebligis, inter 1926 kaj 1938, la publikigon de 12 Jarlibroj kaj, inter 1929 kaj 1934, de 6 “Oficialaj Bultenoj”.

Dua Periodo

La Cirkulero N° 19a havas la daton Junio 1939, la N° 20a la daton Marto 1946: ĉi tiu estis fakte nur voko al ĉiuj antaŭmilitaj L.K.-anoj, ke ili donu signon de vivo kaj montru sian deziron pri plua kunlaborado. El la 102 membroj de 1939 respondis 48 – kaj tiu sola fakto montras, kian rompon la milito kaj ĝiaj sekvoj faris en la funkciado de niaj Lingvaj Institucioj. La Prezidanto Isbrucker opiniis la situacion taŭga por funda reorganizo, kiu forigus la ĝenan kaj temporaban duoblecon inter la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio; li do proponis novan statuton, kiu, post multaj diskutoj kaj modifoj, estis fine voĉdonita la 20an de Julio 1948.

La ĉefaj ŝanĝoj estis: 1° la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kunfandiĝas en unu solan korpon, nomataj “Akademio de Esperanto” (Art. 1); 2° La nombro de la akademianoj estas prefere ĉirkaŭ 40, sed ĝi ne povas esti pli ol 50 (Art. 3); 3° Kandidatojn por la Akademio povas proponi ĉiu Esperantista organizaĵo kaj ĉiu unuopa esperantisto, kiu ankaŭ povas proponi sin mem (Art. 8); 4° Povas esti kreaĵoj “Konsilantaj Komitatoj de la Akademio”, organizitaj sur teritoria, nacia, naci-lingva aŭ faka bazo, sub la gvidado de unu aŭ pluraj akademianoj, por helpi al la laboroj de la Akademio (Art. 17-20).

Tiu statuto kun la paso de la jaroj montriĝis neoportuna pri la tri lastaj punktoj: *a)* ne estis antaŭvidita konstanta rilato inter la nombro de la akademianoj kaj ilia po-triona rebalotado ĉiun trian jaron (en 1963 la 3 trionoj konsistis respektive el 14, 5 kaj 21 anoj!); *b)* la facileco de proponado okazigis multiĝon de la kandidatoj, inter kiuj vane kaj danĝere dividiĝis la voĉoj, tiel ke oni devis plurfoje rekomenci la baloton kaj multaj estis elektitaj aŭ rifuzitaj per unu sola voĉo; *c)* disponante nek sekretarion nek budĝeton, neniu akademiano povis starigi Konsilantan Komitaton. Jen kial la Prezidanto Waringhien voĉdonigis en Julio 1964 la statuton, kies tekston oni trovas ĉi-poste.

Dum tiu dua periodo la Prezidantoj de la Akademio estis ĝis 1963 J. R. C. Isbrucker, kaj de tiu dato Gaston Waringhien (1901–), agregaciulo pri lingvistiko, emerita profesoro ĉe la Pariza “Brita Instituto”.

Direktoroj de la Sekcioj estis denove elektitaj nur en 1951; de tiam ili estis sinsekve:
Por la Ĝenerala Vortaro: G. Waringhien (1951-1965); A. Albault (1965 –),
por la Gramatiko: W. Lippmann (1951-1965); D. B. Gregor (1965 –);

por la Teknikaj Vortaroj: J. Okamoto (1951-1956); A. R. Haferkorn (1958 –);
por la Bibliografio: P. Neergaard (1951 –);
por la Literaturo: G. Avril (1951-1953); I. Rotkvič (1954-1965); W. Auld (1965 –), Sekcio pri
Prononcado estis kreita en 1958 laŭ la propono kaj sub la gvidado de C. Støp-Bowitz.

Sekretario-kasisto estis, laŭ lia propra propono, la Prezidanto Isbrucker mem ĝis 1963; poste A. Albault (1963-1965) kaj R. Bernard (1965 –).

Aktoj de la Akademio ĝis 1963 estis:

I°. Oficialigo de la sufikso **–end** (Julio 1953). **II**°. La Sepa Oficiala Aldono al la U.V., preparita de G. Waringhien en Junio 1955, voĉdonita en Julio 1958: tri listoj: *a*) 84 komunuzaj vortoj kaj 35 propraj nomoj, entenataj en la ceteraj partoj de la Fundamento ekster la U.V.; *b*) 16 oficialigitaj vortoj finiĝantaj per **–log** kaj **–nom**, respondaj al la jam oficialaj vortoj finiĝantaj per **–logi** kaj **–nomi**; *c*) 15 oficialigitaj agentnomoj respondaj al jam oficialaj abstraktaj nomoj finiĝantaj per **–grafi** ktp. **III**°. El la “Listo de la oficialaj vort-elementoj”, entreprenita de Isbrucker en 1938, nur la litero A estis redaktita, kaj oficialigita nur parte en 1953.

La aktoj de la Akademio ekde 1964 estas reproduktitaj en la dua, lingva parto de ĉi tiu Bulteno.

La elspezoj de la Akademio estis kovritaj per konstanta subvencio de U.E.A., per oftaj subvencioj de S.A.T. (1955, 1959, 1960, 1961, 1962, 1963, 1966) kaj per okazaj subvencioj de la Sveda Esperanto-Federacio (1952), de la Brazila Ligo (1958, 1959, 1960) kaj de la nederland-flandra Federacio de Laboristaj Esperantistoj (1964, 1965, 1966). Estus dezirinde, en la tempo kiam la Akademio reaktiviĝis kaj planas i.a. la eldonon de la Baza Radikaro, ke ankaŭ aliaj organizoj subvencie helpu al ĝia laborado.

* * *

STATUTO de la Akademio de Esperanto

* * *

CELO

Art. 1. La *Akademio de Esperanto* – mallonge indikota per la vorto *Akademio* – estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

La Akademio transprenis la celojn kaj la laborojn de la antaŭa “Lingva Komitato” kaj de ĝia “Akademio”, kaj daŭrigas la taskojn de tiuj Lingvaj Institucioj.

ORGANIZO

2. Kiel membroj de la Akademio estas elekteblaj la esperantistoj, kies kapabloj kaj agado sur la tereno de la Lingvo Internacia garantias ilian kompetentan partoprenon en la laboroj de la Akademio, t.e. ĉefe:

- la sendiskute rekonitaj esperantologoj;
- la eminentaj pedagogoj aŭ leksikologoj, kiuj per siaj laboroj grave helpis al la instruado de Esperanto;
- la aŭtoroj, kies Esperantaj verkoj, originalaj aŭ tradukitaj, efektive kontribuis, sur la beletra, teknika aŭ scienca kampo, al la kultura riĉiĝo de nia lingvo.

La membreco de la Akademio ne estas honora titolo, sed ĝi postulas fidelan kaj konsciencan partoprenon en la laboroj de la Akademio.

3. La nombro de la Akademianoj estu principe 45.

4. En la Akademio estas organizataj *Sekcioj*, kiuj studos la demandojn rilatajn al specialaj lingvaj fakoj: *gramatiko*, *ĝenerala vortaro*, *teknikaj vortaroj*, *literaturo* k.a. La Sekcioj povas esti kreataj laŭbezone kaj ilia nombro ne estas limigita.

Ĉiu Sekcio estas gvidata de *Direktoro*.

Ĉiu Akademiano povas aliĝi al unu aŭ pluraj Sekcioj, por kiuj li sentas sin speciale kompetenta aŭ al kiuj li volas prefere dediĉi siajn fortojn.

5. La *Estrararo* de la Akademio konsistas el:

- la *Prezidanto* de la Akademio;
- unu aŭ du *Vicprezidantoj*;
- la *Ĝenerala Sekretario-Kasisto*, se eble salajrata.

Cetere la oficoj de la Estraranoj estas sensalajraj, sed la Estraranoj havas rajton je kompenso por necesaj elspezoj.

6. La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto la relativa plimulto decidas. En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

7. La Akademianoj konservas sian postenon dum 9 jaroj; ili estas reelekteblaj.

Ĉiun trian jaron unu triono de la membroj estas submetata al rebaloto. Por la tabelo de tiuj balotoj la membroj estas dividitaj en tri Grupoj laŭ siaj jaroj de eliro.

Se unu aŭ pluraj postenoj fariĝas vakantaj inter du regulaj elektoj, la elekto por ties plenumo okazos ĉe la sekvanta regula elekto: en tiu baloto, estos unue provizataj la 15 postenoj de la Grupo submetita al la elektado; poste la vakantaj postenoj estos atribuitaj al la elektitoj ricevintaj malpli da voĉoj ol la 15 unuaj; se estas vakantaj postenoj en du Grupoj, oni krome zorgos, ke kandidato ricevinta pli altan nombron da voĉoj estu elektita al la pli longa periodo de membreco.

8. Por fariĝi kandidato por la Akademio, esperantisto devas esti proponita de almenaŭ 5 Akademianoj, kiuj reprezentu almenaŭ tri malsamajn naciajn lingvojn.

Tiu regulo ne aplikiĝas al la Akademianoj, kiuj ĵus finis sian periodon de aktiveco: ili estas aŭtomate prezentataj al reelekto, krom se tion ili rifuzas.

9. Antaŭ ol submeti kandidaton al baloto, la Prezidanto demandas lin pri lia aĝo, ricevita scienca kaj faka instruo, profesia kariero, scio de naciaj lingvoj, Esperanto-agado – aparte pri publikigaĵoj en kaj pri Esperanto – , fideleco al la Fundamento de Esperanto kaj konsento konstante kunlabori en la Akademio.

La Prezidanto, se la ĝisnunaj verkoj de la kandidato ne igas tion superflua, ankaŭ petas la opinion pri li de la Nacia Asocio aŭ de alia kompetenta institucio en la lando aŭ regiono, al kiu la kandidato apartenas. La Prezidanto komunikas al la elektontoj la ricevintajn respondojn de kaj pri la kandidato.

10. Pri la dezirindeco de la elekto de kandidato decidas en unua loko lia kompetenteco.

Pri la divido de la postenoj inter la diversaj lingvoj kaj nacioj ne ekzistas deviga regulo; sed estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj lingvoj, en la unua loko la gravaj kulturlingvoj, estu reprezentataj en la Akademio.

11. La membroj de la Estraro kaj la Direktoroj de la Sekcioj estas elektataj de la Akademio por tri jaroj. Tiuj elektoj okazas ĉiun trian jaron tuj post la elekto de la triono de Akademio.

La elirantaj Estraranoj estas reelekteblaj.

En okazo de intertempe vakanta loko en la Estraro la Prezidanto aŭ Vicprezidanto tuj okazigas elekton. La intertempe elektita Estrarano estas submetata al rebaloto ĉe la fino de la kuranta trijara periodo. Tio sama validas pri la Direktoroj.

TASKOJ KAJ DECIDOJ

12. La Akademio esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton. Ĝi verkas vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto. Ĝi verkas teknikajn terminarojn, aŭ kontrolas kaj aprobas tiajn terminarojn, verkitajn de aliaj aŭtoroj. Ĝi revizias aperintajn verkojn kaj kritikas ilin el lingva vidpunkto. Ĝi povas doni premiojn al la aŭtoroj de la plej bonaj aperintaj verkoj.

La Akademio defendas Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia.

13. La Akademio devas esplori demandojn, prezentitajn al ĝi de unu el la sekvantaj instancoj:

- a) la Prezidanto aŭ la estraro;
- b) la Direktoro de unu el la Sekcioj;
- c) almenaŭ 5 Akademianoj.

La Akademio povas ankaŭ esplori demandojn prezentitajn al ĝi de iu esperantista organizaĵo, de unuopa persono aŭ de grupo da personoj.

14. Se iu lingva demando apartenas al la laborkampo de iu Sekcio, la Direktoro de tiu Sekcio, konsultinte ties membrojn, ellaboras raporton, pri kiu voĉdonas la Akademio. Se ne ĉiuj Sekcianoj samopinias, la raporto prezentu la diversajn vidpunktojn, kaj, post ĝia komunikado al la Akademianoj, la Estraro lasu almenaŭ dumonatan intertempon por la diskutado, antaŭ ol voĉdonigi la Akademion pri la konkludoj de la raporto.

15. Pri ĉiu studita demando la Akademio prenas decidon. La decidoj povas esti nuraj rekomendoj aŭ malrekomendoj, aŭ definitivaj aproboj aŭ malaprobaj.

16. La Akademio solvas la al ĝi submetitajn lingvajn demandojn laŭ la principoj de la “Fundamento de Esperanto”.

Pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvouzo ĝi decidas per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj.

Se temas pri enkonduko de lingva novaĵo aŭ pri ŝanĝoj de pli fruaj decidoj de la Akademio aŭ de la Lingva Komitato, la aprobo de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj estas necesa.

En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

Se laŭ la supraj kondiĉoj decido ne povas esti atingita, la demando estas submetata al nova voĉdono.

17. La Akademio povas starigi oficialajn rilatojn kun organizoj eksteraj, i.a. kun fakaj komisionoj de specialistoj kaj kun naciaj Esperanto-Institutoj, se tiuj rekonas ĝian lingvan aŭtoritaton kaj devigas sin submeti al ĝia kontrolo la rezultojn de siaj laboroj.

EKSIGOJ

18. Membroj de la Akademio povas esti eksigitaj:

- a) se ili kvarfoje sinsekve ne respondis leterojn aŭ cirkulerojn de la Prezidanto, de la Estraro aŭ de la Direktoro de la Sekcio, al kiu ili apartenas, se ili ne partoprenas en la voĉdonoj aŭ alimaniere klare montras sian nekapablecon aŭ indiferentecon por la plenumo de sia ofico;
- b) se ili agis publike aŭ kaŝe kontraŭ Esperanto ĝenerale aŭ kontraŭ la Akademio aparte;
- c) se ili pro malhonora ago estis kondamnitaj de leĝa tribunalo al puno de mallibereco.

19. Pri eventuala eksigo la Akademio decidas, se eble post esploro de la klarigoj de la interesato, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj. En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

FINANCOJ

20. La Akademio trovas siajn financajn fontojn en subvencioj de la Universala Esperanto-Asocio kaj de aliaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj volas subteni ĝian laboron, kaj en donacoj de esperantistoj.

21. Ĉiujare la kontoj de la Akademio estas publikigataj en la Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio.

OFICIALAJ ORGANOJ

22. Por diskonigi siajn laborojn kaj decidojn, la Akademio publikigas “Oficialajn Informojn de la Akademio de Esperanto” en formo de cirkuleroj, sendataj al la Akademianoj kaj al la esperantistaj gazetoj, kiuj deklaris, ke ili konsentas represi ilin.

23. Laŭbezone kaj laŭ la financaj rimedoj la Akademio povas ankaŭ publikigi presitan kajeron kun la titolo “Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto”.

ŜANĜOJ EN LA STATUTO

24. Proponi ŝanĝon en la statuto povas ĉiu Akademiano, kaj tiu propono devas esti submetita al voĉdono, se almenaŭ 4 aliaj Akademianoj ĝin apogas.

25. Pri propono por ŝanĝo de la Statuto decidas la Akademio post raporto de la Estraro. Por esti akceptita, tia propono bezonas la aprobon de minimume du trionoj de la membroj de la Akademio.

AKADEMIO de ESPERANTO

* * *

Estraro

Prezidanto: Prof. G. Waringhien.

Vicprezidanto: D-ro P. Neergaard, Lekt. A. D. Atanasov.

Sekretario-Kasisto: S-ro R. Bernard.

Sekcioj

Sekcio pri la gramatiko.

Direktoro: Mag. D. B. Gregor.

Membroj: A. Albault, H.A. de Hoog, I. Lapenna, J. Régulo Pérez, T. Pumpr, J. H. Rosbach, G. G. Sevak, K. E. Vilborg.

Sekcio pri la ĝenerala vortaro.

Direktoro: A. Albault.

Membroj: A. Atanasov, D. B. Gregor, N. Kawasaki, J. Régulo Pérez, R. Rossetti, V. Setälä, K. E. Vilborg.

Sekcio pri la teknikaj vortaroj.

Direktoro: A. R. Haferkorn.

Membroj: N. Kawasaki, ...

Korespondanto: A. Broise.

Sekcio pri Bibliografio.

Direktoro: P. Neergaard.

Membroj: ...

Sekcio pri Literaturo.

Direktoro: W.Auld.

Membroj: R. Bernard, J. Régulo Pérez, R. Rossetti.

Sekcio pri Prononcado.

Direktoro: C. Støp-Bowitz.

Membroj: A. D. Atanasov, Cl. Conterno.

LISTO DE LA AKADEMIANOJ

* * *

1. Laŭ la alfabeto ordo.

(La liveritaj indikoj estas sinsekve: nomo, antaŭnomo(j), ĉefa akademia diplomo, nuna funkcio aŭ profesio, adreso. La membroj, pri kiuj kelkaj indikoj mankas aŭ estas eraraj, bonvolu informi la Sekretarion por venonta eldono.)

ALBAULT André – D-ro pri medicino, – Oftalmologo – 32 Av. Etienne-Billières, 31-TOULOUSE-03, Francujo.

ARISTE Paul – D-ro pri filologio – Prof. de finno-ugraj lingvoj ĉe la Univ. de Tartu, membro de la Soveta Akademio – Jakobsoni 7-A, TARTU, Estonio, Sovet-Unio.

ATANASOV Atanas Danĉev – Diplomito pri slava filologio kaj pri ekonomikaj sciencoj – Emerita Instruisto de bulgara lingvo kaj filologio en gimnazio, eksa eksteretata kunlaboranto ĉe la Instituto de bulgara lingvo de la Akademio de Sciencoj, eksa Direktoro de industriaj fabrikoj – VI. Poptomov 48, SOFIA, Bulgarujo.

AULD William – Magistro de la Glasgova Univ. pri angla lingvo kaj literaturo – Ĉefinstruisto kaj Vicdirektoro de urba mezlernejo – 20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando-Britujo.

BERNARD Roger – Direktoro de firmo – 26 rue Pierre-Joigneaux, 92-BOIS-COLOMBES, Francujo.

BOKAREV E. A. – D-ro pri filologiaj sciencoj – Prof., ĉefo de sekcio pri kaŭkazaj lingvoj en Lingvosciencia Instituto – Volhonka 18/2, MOSKVA G-19, Sovet-Unio.

BOULTON Marjorie – Magistrino de la Oksforda Univ. pri angla lingvo kaj literaturo – Direktorino de Seminario por instruistoj – Charlotte Mason College, AMBLESIDE, Westmorland, Anglujo.

BUGGE-PAULSEN Rolf E. – Abituriento – Emerita infanteria Kapitano – Dunkersgate 3-A, OSLO-3, Norvegujo.

BUTLER Montagu Christie – Licenciulo de la Reĝa Akademio de Muziko – Emerita orgenisto kaj muzik-instruisto – 1 Ayliffe Close, Cambridge Gardens, KINGSTON-on-THAMES, Surrey, Anglujo.

COLLINSON William Edward – D-ro de la Heidelberga Univ. pri filozofio – Emerita Prof. pri germana lingvo ĉe la Liverpola Univ. – 8 Aigburth Drive, Flat 6, LIVERPOOL-17, Anglujo.

CONTERNO-GUGLIELMINETTI Clelia – D-rino pri beletristiko – Prof. en Seminario por instruistoj – Viale XXV Aprile 151, 10133-TORINO, Italujo.

CSEH András – eksa Pastro katolika – Direktoro de Internacia Esperanto-Instituto – Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.

DOMINGUES Carlos A. G. – D-ro pri juro – Prof.; Teknika Konsilisto de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko – rua Alvaro Alvim 27/61, RIO DE JANEIRO, Brazilo.

DOWNES William John – Magistro pri filozofio kaj teologio ĉe la Londona Univ. – Emerita prof.; Pastro de Kongregaciaj Eklezioj – The Manse, PLYMTREE-CULLOMPTON, Devon., Anglujo.

FAULHABER Frits A.F. – Pensiita ĉefdompentristo – Marathonsweg 15-II, AMSTERDAM-Z. II, Nederlando.

GREGOR Douglas Bartlett – Magistro pri klasikaj lingvoj ĉe la Oksforda Univ. – Prof. Pri latina, greka kaj itala lingvoj en liceo – 34 Watersmeet, NORTHAMPTON, Anglujo.

ĜUĜEV Stojan Stoar – Diplomito de la ŝtata Akademio de Muziko en Sofio, Doktoro de la Pariza Sorbonne – Prof. kaj Katedestro pri muzikologio ĉe la Sofia Konservatorio – Bul. Ruski 33, SOFIA, Bulgarujo.

HAFERKORN A. Rudolf – Diplomita Inĝeniero ĉe la Dresdena Teknika Univ. – Emerita Supera Poŝtkonsilisto de la Germana Telekomunika Servo – Edeldorfer Weg 28-A, 8480 WEIDEN i. d. OBERPFALZ, Federacia Germanujo.

HODAKOWSKI Tadeo Kazimiro – Magistro de la Krakova Univ. pri juro, pri filozofio kaj pri pola filologio – Direktoro de teknika mezlernejo – Kosciuszki 26, NOWY SACZ, Polujo.

HOOG Hendrik Arie de – Diplomito pri instruado de matematiko, de la franca kaj angla lingvo – Direktoro de mezlernejo – Archimedesweg 68, AMSTERDAM-6, Nederlando.

JUNG Theodor August Heinrich – Eldonisto kaj eksgazetredaktoro – Harstenhoekweg 223, SCHEVENINGEN, Nederlando

KALOCSAY Kálmán – D-ro pri medicino – Eksĉefkuracisto de Budapeŝta Hospitalo por infektaj malsanoj; Prof., Korespondanto de la Medicina Akademio – Nyúl utca 4. II, BUDAPEST-II, Hungarujo.

KAWASAKI Naokazu – Diplomito de la Waseda Univ. – Ŝtat-universitata Prof. pri lingvoscienco ĉe la Osaka Univ. – II-49 Bandai-higasi, Sumiyosiku, OSAKA, Japanujo.

LAPENNA Ivo – D-ro pri internacia juro ĉe la Zagreba Univ. – Prof. (Reader) pri Soveta kaj Orienteŭropa juro ĉe la Londona Univ. – 77 Grasmere Av., WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.

LIPPMANN Walter – D-ro pri juro – Advokato – Grillparzerstrasse 4, 2000 HAMBURG 22, Federacia Germanujo.

MIJAKE Ŝihej – Diplomito de la Japana Scienca Konsilio pri literaturscienco – Administranta Direktoro de Japana Esperanto-Instituto – Hongo 2.2.14, TOKIO, Japanujo.

NAKAMURA Teruo – Diplomito de komerca altlernejo – Ĵurnalisto – 75 Bunki-cho, Sujaku, Shimokyo-ku, KYOTO, Japanujo.

NEERGAARD Paul – D-ro de la Kopenhaga Univ. pri agronomio – Direktoro de Sempatologia Instituto por evolulandoj – Gothersgade 158, KØBENHAVN-K, Danujo.

PUMPR Tomáš – D-ro de la Praga Univ. pri juro – Ŝtata oficisto – Thälmannova 8, PRAHA-6, Bubeneč, Ĉeĥoslovakujo.

RAKUŠA Rudolf – Diplomito de instruisto pri pedagogio kaj germana lingvo – Prof. de mezlernejo – Vrbanska c. 5, MARIBOR, Jugoslavujo.

RÉGULO PÉREZ Juan – Licenciito pri klasika filologio – Docento pri lingvistiko ĉe la Univ. de la Laguna; Katedra Prof. De Esperanto ĉe la Univ. de La Laguna. – Apartado 25, LA LAGUNA de TENERIFE, Kanariaj Insuloj, Hispanujo.

ROSBACH Johan Hammond – Lektoro pri lingvoj – Hulderveien 17-B, SARPSBORG, Norvegujo.

ROSSETTI Reto – Magistro de la Edinburga Univ. pri arto kaj pedagogio – Estro de artepedagogia fako ĉe la Bristola Univ. – 120 Cromwell Road, BRISTOL-6, Anglujo.

ROTKVIČ Ivo – D-ro pri juro ĉe la Zagreba Univ. – Administra estro ĉe la Kroata Naturscienca Societo – Cvjetno naselje 21, ZAGREB-I, Jugoslavujo

SETÄLÄ Vilho – Magistro pri filologio – Verkisto – Esperanto-tie 4, IRISLAHTI (Helsinki), Finnlando.

SEVAK Gurgeno Grigori – D-ro pri la armena filologio – Prof. en la Erevana Univ., Membro-korespondanto de la Akademio de Sciencoj de Armenujo – Poŝtkesto 78, EREVAN, Armenujo, Sovet-Unio.

SÖDERBERG Karl Ludvig – Magistro kaj licenciito pri filozofio – Rektoro de ĉiuj ŝtataj kaj komunumaj lernejoj de la Universitata urbo Uppsala – Luthagesplanaden 15-A, UPPSALA, Svedujo.

SOLZBACHER Wilhelm A. – D-ro pri politikaj kaj ekonomikaj sciencoj – Sekciestro de la ŝtata Usona Radiofonio – 6030 Broad Street, Brookmont, WASHINGTON-16, D.C., Usono.

SONNENFELD Ernesto – Diplomito pri komerco – Emerita reprezentanto por importo – Casilla Correo 620, MONTEVIDEO, Urugvajo.

STØP-BOWITZ Carl – Diplomito pri matematiko kaj naturscienco – Universitata Lektoro, Kuratoro ĉe la Universitata Zoologia Muzeo – Camilla Collets Vei 3, OSLO-2, Norvegujo.

TÁRKONY Lajos – Abituriento – Pensiita oficisto ministeria – Losonci-utca 15-III-2, BUDAPEST-VIII, Hungarujo.

VILBORG K. Ebbe – D-ro pri filozofio – Docento pri la greka lingvo ĉe la Univ. de Göteborg – Prästgårdsängen 23, GÖTEBORG-S, Svedujo.

WARINGHIEN Gaston – Agregaciulo pri lingvistiko – Emerita prof. pri franca lingvo kaj literaturo – 182-G Av. Rouget-de-Lisle, 94-VITRY, Francujo.

WONG KENN – D-ro pri beletristiko – Emerita Prof. ĉe Univ. – 152-A Prince Edward Road, KOWLOON, Hong-Kong, Britujo.

Akademia Korespondanto por la Teknika Vortaro.

BROISE Auguste – Abituriento – Emerita ŝtata Inĝeniero pri publikaj laboroj – La Madeleine, 27-NONANCOURT, Francujo.

2. Laŭ la lingvoj.

(La membroj estas klasitaj laŭ la lingvo de la lando, en kiu ili konstante loĝadas; kiam ĝi ne estas ilia naskiĝlingvo aŭ la oficiala komunlingvo de la Unio, ĉi tiu estas montrita per dekstra referenco: tial okazas, ke la sumo de la reprezentantoj de la diversaj lingvoj superas la nombron de la akademianoj.)

I. Ĝermana familio (5 lingvoj, 14 reprezentantoj).

dana: Neergaard
germana: Haferkorn, Lippmann
nederlanda: Cseh*, Faulhaber, de Hoog, Jung** * hungara
norvega: Bugge-Paulsen, Rosbach, Støp-Bowitz ** germana
sveda: Söderberg, Vilborg

II: Slava familio (6 lingvoj, 10 reprezentantoj).

bulgara: Atanasov, Ĝuĝev
ĉeĥa: Pumpř
pola: Hodakowski
rusa: Bokarev
serbokroata: Rotkvič
slovena: Rakuša

III. Latinida familio (4 lingvoj, 8 reprezentantoj).

franca: Albault, Bernard, Waringhien
hispana: Régulo Pérez, Sonnenfeld* * germana
itala: Conterno
portugala: Domingues

IV. Finno-ugra familio (3 lingvoj, 5 reprezentantoj)

estona: Ariste* * rusa
finna: Setälä
hungara: Kalocsay, Tárkony

V. Angla komplekso (9 reprezentantoj).

Anglujo: Boulton, Butler, Collinson, Downes, * kroata
Gregor, Lapenna*, Rossetti** ** itala
Skotlando: Auld
Usono: Solzbacher* * germana

VI. Ekstrem-orienta grupo (2 lingvoj, 4 reprezentantoj).

ĉina: Wong Kenn
japana: Kawasaki, Mijake, Nakamura

VII. Aliaj lingvoj (1 lingvo, 1 reprezentanto).

armena: Sevak* * rusa

3. Laŭ la jaroj.

(La elirjaro estas, por ĉiu Grupo, la lasta jaro de akademianeco de ĉiuj ties membroj. La interkrampaj ciferoj montras sinsekve la naskiĝjaron de la membro, la jaron de lia esperantistiĝo kaj tiun de lia elektiĝo en la Akademion; la kursivaj ciferoj, eventuale troviĝantaj post la du unuaj nombroj, montras la jaron de elektiĝo en la antaŭmilitan Lingvan Komitaton kaj eventuale en ties Akademion. Oni forigis el ĉiu jara nombro la du unuajn ciferojn, pri kiuj ne povas esti dubo.)

GRUPO III.

ELIRJARO: 1970.

MEMBROJ: 15.

Albault (23 – 39 – 62).
Bokarev (04 – 18 – 62).
Bugge-Paulsen (91 – 07 – 32 – 49).
Butler (84 – 05 – 09 – 49).
Collinson (87 – 04 – 26 – 29 – 49).
Cseh (95 – 10 – 32 – 34 – 49).
Hodakowski (03 – 26 – 30 – 62).
Kalocsay (91 – 12 – 22 – 49).

Lippmann (95 – 08 – 23 – 23 – 49).
Setälä (92 – 06 – 21 – 30 – 49).
Solzbacher (07 – 21 – 49).
Støp-Bowitz (13 – 28 – 49).
Vilborg (26 – 40 – 62).
Wong Kenn (98 – 14 – 23 – 62).
Vakanta posteno.

GRUPO I.

ELIRJARO: 1973.

MEMBROJ: 15.

Atanasov (92 – 08 – 64).
Auld (24 – 34 – 64).
Bernard (07 – 31 – 64).
Downes (92 – 23 – 64).
Faulhaber (93 – 12 – 53).
Jung (92 – 10 – 33 – 49).
Kawasaki (02 – 19 – 33 – 49).
Lapenna (09 – 28 – 53).

Neergaard (07 – 24 – 35 – 49).
Rakuša (93 – 22 – 35 – 49).
Régulo Pérez (14 – 33 – 53).
Rotkvič (01 – 21 – 35 – 49).
Söderberg (03 – 29 – 53).
Sonnenfeld (05 – 28 – 67).
Waringhien (01 – 16 – 26 – 37 – 49).

GRUPO II.

ELIRJARO: 1976.

MEMBROJ: 15.

Ariste (05 – 21 – 67).
Boulton (24 – 49 – 67).
Conterno (15 – 34 – 64).
Domingues (96 – 09 – 32 – 49).
Gregor (09 – 22 – 64).
Ĝuĝev (02 – 17 – 67).
Haferkorn (96 – 21 – 57).
de Hoog (10 – 37 – 62).

Mijake (01 – 20 – 67).
Nakamura (11 – 29 – 62).
Pumpr (06 – 26 – 62).
Rosbach (21 – 38 – 62).
Rossetti (09 – 28 – 67).
Sevak (04 – 21 – 32 – 64).
Tárkony (02 – 19 – 67).

MEMORPAĜO

Dum la pasintaj kvin jaroj malaperis, bedaŭrataj de siaj kolegoj, jenaj akademianoj:

Stamadiadis Anakreon, greka, mortinta la 24.VII.1964, 94-jara;

* * *

Dalmau Gener, kataluna, m. la 15.IV.1965, 74-jara;

* * *

Obruĉev Sergej Vladimiroviĉ, rusa, m. la 21.VIII.1965, 74-jara;

* * *

La Colla Stefano, itala, m. la 5.II.1966, 76-jara;

* * *

Krestanov Ivan Haralambiev, bulgara, m. la 4.IV.1966, 76-jara;

* * *

Pragano Sigmundo, rumana, m. la 26.XI.1966, 59-jara;

* * *

Isbrucker Johannes Rijk Gerardus, nederlanda, m. la 20.I.1967, 78-jara;

* * *

Baghy Gyula, hungara, m. la 18.III.1967, 76-jara;

* * *

Szilágyi Ferenc, hungara, m. la 1.XII.1967, 72-jara.

LINGVA PARTO

I. ENKETO kaj DECIDOJ
de la Akademio
pri la demando de
La Pasivaj Participoj

1. AKADEMIA CIRKULERO N° 76a

Choisy-le-Roi, la 3an de Februaro 1965.

Estimata Kolego,

Okaze de la sesdeka datreveno de la oficialigo de nia “Fundamento”, ni opiniis, ke estus dezirinde entrepreni sur la gramatika tereno tion, kio estis jam farita pri la vortaro, t.e. ian sisteman esplorado de la respondoj tie troveblaj al kelkaj sintaksaj problemoj, ekz-e la pasivaj participoj, la pronomoj *si* kaj *sia*, ktp...

En la kadro de tiu esplorado, kaj en akordo kun la Direktoro de la Gramatika Sekcio, la Estraro prezentas al vi la sekvantan demandaron, redaktitan de la Prezidanto. Sur la bazo de viaj respondoj, la Direktoro provos ellabori precizajn regulojn de uzado de tiuj participoj, kiujn la Estraro poste submetos al via voĉdonado.

Ni opinias efektive, ke tia estas la sola racia scienca metodo ekstrakti tiujn problemojn; ke nur serioza pristudo de ĉiu ekzemplo aparte, kaj ne pure ciferaj statistikoj*, povas difini la instruojn de la Fundamento; ke la rezultoj de tiu esploro povas cetere prezenti nur plenan konformecon kun la konstanta uzado de Zamenhof mem; ĉar supozi, ke la kreinto de nia lingvo estus doninta en sia Gramatiko unu regulon pri la participoj, kaj estus aplikinta alian en sia verkaro, tio estus tiel malŝati lian inteligentecon, ke malmultaj el la Akademianoj, ni esperas, apogos tiun supozon. La prudento diktas alian vojon: unue starigi la precizan valoron de la participoj laŭ la oficialaj dokumentoj, kaj due klarigi per tiu valoro la neklarajn aŭ diskutoblajn ekzemplojn trovitajn en la Zamenhofs verkaro.

Ni petas vin, bonvolu respondi ĉi tiun demandon en la limtempo de du monatoj, kiu certe estos sufiĉa por la esploro de la koncerna materialo.

Altestime vin salutas

G. Waringhien	Prezidanto,
W. E. Collinson	} Vicprezidantoj,
P. Neergaard	
R. Bernard	Sekretario.

* *La danĝeron de tiaj statistikoj montros jena eltiraĵo el publika letero de K. Kalocsay: “Kolego Vilborg, bedaŭrinde, lasis sin erarigi de la statistiko de kolego Jung, laŭ kiu ĉe Zamenhof kontraŭ unu devia (= itisma) formo staras 670 nedeviaj (= atismaj), sekve Zamenhof estis “itisto” nur en 0,176%... La lerteco de kolego Jung konsistas en tio, ke la procenton li kalkulas ne el tiuj verboformoj, ĉe kiuj troviĝas diferenco inter atismo kaj itismo, sed el ĉiuj verboformoj, ankaŭ el la simplaj, ĉe kiuj troviĝas nenia diferenco... Formojn atismajn ĉe Zamenhof ĝis nun oni malkovris sume 5: ĉiuj aliaj ŝajne atismaj formoj estas klarigeblaj aŭ kiel iterativoj, aŭ kiel abstraktaj imperfektoj (vd. “Vojaĝo inter la Tempoj” p. 85)...” Kaj li konkludas, ke tiel malgrandega nombro pravas, ke povas temi nur pri pens-, skrib-, leg- aŭ preseraroj. G.W.*

2. DEMANDARO PRI LA UZADO DE LA PARTICIPOJ EN LA FUNDAMENTO

I – Motivigo de tiu ĉi demandaro.

En la jam longa historio de nia lingvo nur du okazoj prezentiĝis, en kiuj gramatika diskuto ricevis vastan publikecon kaj dividis – kaj ĝis nun ankoraŭ plu dividas – la esperantistojn en du skolojn: la afero de la landnomaj sufiksoj kaj la afero de la participaj sufiksoj. Sed en tiuj ĉi du aferoj la pozicio de la demando ne estas ĝuste la sama.

Ĉe la unua problemo, efektive, du punktoj ĉiam restis ekster diskuto: 1° Temas pri konkurenco inter du sufiksoj (**-uj** kaj **-i**), el kiuj ĉiu havas siajn apartajn kromsignifojn, sed kiuj, sur la koncernata tereno, havas ĝuste kaj ekzakte la saman signifon. La ekzisto de du sufiksoj por esprimi la saman ideorilaton povas estigi ja ian embarason (de riĉeco), sed absolute nenian konfuzon pri la kompreno. 2° Neniu iam kontestis, ke la Fundamento prezentas por esprimi tiun saman ideorilaton sole nur la sufikson **-uj**, kaj ĉiu konfesas, ke la eventuala enkonduko de la sufikso **-i** estus unu el tiuj “neologismoj”, kiujn aludas la Antaŭparolo al la Fundamento: la sola demando estas do pesi, ĉu la utileco de tia aldono al la Universala Vortaro estas ĝenerale rekonata, kaj ĉu venis la tempo sankcii tian aldonon.

Ĉe la dua problemo la situacio estas tute mala: 1° Temas pri la samaj verboformoj (ekzemple: **estis -ata** kaj **estis -ita**), al kiuj ĉiu el la du skoloj atribuas malsaman signifon: tiel ke la kunekzisto de tiuj po du signifoj por la samaj formoj neeviteble kreas miskomprenojn. 2° La aserto de unu skolo, ke ĝi uzas la pasivajn verboformojn laŭ la Fundamento, estas kontestata de la alia skolo, kiu siaflanke asertas, aŭ ke la Fundamento ne entenas sufiĉajn klarigojn por decidi pri tiu demando, aŭ eĉ ke ĝi permesas ankaŭ la uzadon praktikatan de tiu alia skolo.

Tiuj du aspektoj de la demando pri la pasivaj verboformoj igas ĝin la plej urĝe diskutenda. Ĉar allasi, ke unu sola konjugacia formo povu esti komprenata en du manieroj, estus pereiga por lingvo internacia, kies esenca kondiĉo estas la senduba klareco, ĉar, laŭ la ĉiam memorinda diro de Zamenhof, “**lingvo plenumas sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin severe egale**”. Kaj ne esplori, kia estas ĝuste la instruo de la Fundamento pri tiu speciala punkto, estus ne nur nescienca sinteno, sed ankaŭ malrespekto al la propra valoro de tiu Fundamento, kiu, laŭ la vortoj de ĝia iniciatinto, “**devas nur savi nin kontraŭ anarĥio**”, kaj perfido de la propra funkcio de la Akademio, kia ĝi estas difinita de ĝia statuto.

* * * * *

Sed tiu ĉi principa motivo ne estas la sola: unu alia, kvankam cirkonstanca, akcelis mian decidon entrepreni la nunan esploron.

Unu el la ĉefaj celoj de niaj propagandaj instancoj estas la enkonduko de nia lingvo en la lernejojn: de pluraj jaroj ilia kampanjo rimarkinde progresis kaj en kelkaj lokoj atingis eĉ pozitivajn sukcesojn. Sed tiuj sukcesoj mem des pli urĝigas ian decidon pri tiu demando: ĉar estas neimageble,

ke devokonscia ŝtatestro aŭ parlamento permesus la devigan instruadon de lingvo tiel malperfekta, ke en ĝi unu sama frazo povus signifi du inter si kontraŭsencajn aferojn (ekz-e:

mi ne povis
ĉar mia aŭto estis riparata ĉi-matene, aŭ *veturi al nia bankedo),*
mi povis

aŭ, ke unu sama frazo povus havi du tre malsimilajn signifojn, ekz-e “Estas interkonsentite, ke la vilaĝoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj antaŭ 1966”: kiu klaŭzo signifas, por unuj, ke la rekonstruadon oni *komencos* antaŭ 1966, kaj por la aliaj, ke la rekonstruadon oni *finos* antaŭ 1966.

En la tute ne malverŝajna okazo, se malamiko de nia afero turnus la atenton de favora ministro de edukado sur tiun gravan difekton, kaj se tiu ministro demandus min, kiel Prezidanton de nia plej alta lingva institucio, kiun sencon la Akademio rigardas korekta, mi devus povi doni klaran kaj difinitan respondon.

Cetere, de tiel longa tempo la du skoloj argumentadas unu kontraŭ la alia, ke la Esperanta publiko komencas miri pri la silentado de ĝia lingva institucio kaj dubi pri ties utileco.

Jen kial esplori nun tiun demandon postulas de ni same kiel la interesoj de la lingvo mem kaj de nia movado, tiel ankaŭ la digno de nia Akademio.

II – Metodo de la nuna esploro.

Ne povas temi pri analizo, komparado kaj diskutado de la diversaj teorioj elmetitaj diversflanke pri tiu demando. Krom tio, ke, laŭ la saĝa konsidero de Zamenhof, “teoria diskutado kondukos al nenio”, ni estas ligitaj per la Artikolo 16-a de nia statuto, laŭ kiu la “Akademio solvas la lingvajn demandojn laŭ la principoj de la Fundamento de Esperanto”. Ni devas do simple esplori tiun bazan dokumenton “por ĉiam devigan por ĉiuj esperantistoj”, kolekti la informojn, kiujn oni povas tie trovi pri la uzado de la pasivaj verboformoj, kaj konstati, ĉu el la du skoloj ili pravigas unu aŭ ambaŭ aŭ neniun.

Tiun esploron mi penos fari en la plej objektiva maniero; mi ne kontentiĝos per simpla elnombrado de la ekzemploj, nek postulos, ke vi fidu al mi pri ilia interpretado kaj klasifikado. Ĉar estas evidente, ke ĉiu el vi povas kompreni ilin en alia maniero, ol la mia, tial, ĉe ĉiu grava punkto mi petos vin esprimi precize vian opinion per “*jes*”, “*ne*” aŭ “*sindetene*”. Tia proceduro, kiu estus absurda, se temus pri pruvado de ia scienca veraĵo, estas la plej taŭga, por difini la ĝustan sencon de jam ekzistanta kaj de neniun kontestita teksto, kiu estis destinita al la tuta esperantistaro kaj kies sencon povas kaj devas difini ties ĝenerala konsento. Ĉar finfine tio, kion ni urĝe bezonas, estas praktika gvidregulo, kaj tian povas ja starigi nur formala voĉdono de la Akademio, al kiu la esperantistaro konfidis la decidon de la lingvaj problemoj.

Se per tiu esplorado ni sukcesos atingi pozitivan rezulton, ni estos farintaj almenaŭ unu paŝon al la solvo de la demando; de tiam ni disponos oficialan interpretadon, difinantan, kiu sistemo de pasiva konjugacio estas fundamenta, kaj kiu ne. Tiel fariĝos klare kaj ne plu diskuteble, ke iuj ajn aliaj sistemoj estas pure privataj iniciativoj kaj deflankiĝoj personaj.

Por tiu esplorado mi uzos la sciencon eldonon de la Fundamento, publikigitan de nia kolego Albault ĉe la Esperantaj Francaj Eldonoj (1963). Mi supozas, ke ĉiu el vi ĝin disponas.

III – Kriterioj uzataj ĉe mia esplorado.

Por povi senkonfuze difini la pozicion de la Fundamento rilate al la du skoloj, estas necese precizigi unue, en kio kaj pri kiuj punktoj tiuj ĉi diferencas.

1) La plej unuavide frapanta diferenco estas ĉe ilia uzo de la formo “*estis -ita*”. Por unu skolo – ni diru: la skolo A – tiu estas pluskvamperfekto (antaŭpreterito). Ekz-e la frazo: “Oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita” signifas, ke en okazo antaŭa al tiu transportado oni jam pli frue operaciis lin en tiu sama hospitalo.

Por la alia skolo – ni diru: la skolo Z – tiu formo prezentas la normalan pasivan preteriton kaj signifas simple, ke io okazis en la pasinteco; tiu sama formo povas laŭokaze ludi la rolon de pluskvamperfekto, se la kunteksto igas tion klara. Ekz-e la frazo: “Oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita” signifas, ke la operacio okazis post la transportado; kaj la pluskvamperfektan sencon, kiun la skolo A atribuas al tiu frazo, la skolo Z esprimas per modifo de la kunteksto: “Oni transportis lin en hospitalon, en kiu li jam antaŭe estis operaciita.”*

Tiun facile uzeblan kriterion mi uzos en la unua parto de mia esploro.

2) Alia kriterio, iom pli delikata, estas la uzmaniero de la sufikso **-at-** ĉe la pasivaj verboformoj. Por la skolo A tiu sufikso havas nur tempan valoron kaj signifas, ke la pasiva ago okazas en la priparolata momento. Ekz-e la frazo: “La 30-an de Decembro mi estis renversata de aŭtomobilo” signifas simple, ke tiu akcidento okazis en la dirita tago.

Por la skolo Z tiu sufikso signifas, ke la pasiva ago ankoraŭ ne atingis sian finiĝon aŭ plenumitecon, ĉu pro tio, ke ĝi plu kaj plu daŭras, ĉu pro tio, ke ĝi ree kaj ree ripetiĝas. Ekz-e la frazo: “La 30-an de Decembro li estis batata de nekonatoj” signifas, aŭ ke la batado longe daŭris, aŭ ke ĝi plurfoje okazis en tiu sama tago.

Tiun ĉi duan kriterion mi uzos en la dua parto de mia esploro. Tiamaniere oni povos kontroli la rezultojn de la apliko de la unua kriterio per tiuj de la apliko de la dua, kaj atingi pli grandan certecon.

IV – La esplorendaj dokumentoj.

La “Fundamento de Esperanto” konsistas el kvar partoj: Antaŭparolo, Gramatiko en kvin lingvoj, Ekzercaro, Universala Vortaro. Ĉar la Antaŭparolo ne estis oficiale rigardita kiel parto de la Fundamento ĝis 1958**, kaj la Universala Vortaro evidente ne apartenas al nia studokampo, nur la duan kaj trian parton koncernos mia esploro.

* Nia kolego Jung kolektis en “*La Esperanta Konjugacio*” (p. 163) amason da ekzemploj por pruvi, ke en la rilatpropozicioj Zamenhof uzas la formon “*estis -ita*” sole nur por esprimi antaŭan okazaĵon. Sed li preteratentis du-tri detalojn: 1° En ĉiu el la ekzemploj kolektitaj de li temas pri rilatpropozicioj epitetaj, dum en la ĉi-supra frazo temas pri pseŭdo-subpropozicio (ĉar kiu = kaj tiu), donanta novan informon, montranta pluan etapon en la rakontado: la samaj reguloj povas do ne validi por tiuj du malsamaj specoj de propozicioj. 2° Kaj efektive nia kolego de Hoog demonstris, ke, kiam Zamenhof uzas unu el tiu dua speco (kiun oni povus nomi: *kontinuativa*), li donas al “*estis -ita*” la sencon de simpla preterito, esprimanta postvenantan okazaĵon; pruvo, inter multaj: “En la fenestro staris mirtujo, kiu estis ŝovita iom flanken, por ne esti elpuŝita, dum la maljuna fraŭlino sin klinis antaŭen, por rigardi.” (*Fabeloj de Andersen*, III, p. 112: la ŝovado okazas post la stato priskribita en la ĉefpropozicio!). Ke T. Jung ne rimarkis tiajn frazojn, kiujn trovi ne estas malfacile, ne estas rekomendo pri la ĝusteco de liaj “*statistikoj*”. 3° Cetere, se oni volus, malgraŭ la uzado de Zamenhof, tute malpermesi tiajn *kontinuativajn subpropoziciojn*, sufiĉus skribi: “Oni transportis lin en hospitalon: en tiu li estis operaciita”, por retrovi skemon de frazo bone konatan de T. Jung (Vidu “*Lingvo kaj Vivo*”, p. 191). G.W.

** Vidu la “*Sepan Oficialan Aldonon*”.

La kvinlingva Gramatiko tuŝas nian temon en sia paragrafo 6a. Sed ĝi donas pri ĝi nur morfologiajn indikojn, kiel klare montras la subtitolo aŭ anonco, troviĝanta tiuloke en la kvin lingvoj, kiu tradukiĝas per “**Formoj de la Verbo**”. Kie oni parolas pri “formoj”, oni evidente ne intencas paroli pri la uzmaniero de tiuj formoj.

Vere estas, ke la diversaj participaj sufiksoj estas nomataj per nacilingvaj vortoj, kiuj en ĉiu lingvo egalas al “participo aktiva prezenca, preterita, futura”, “participo pasiva prezenca, preterita, futura”: sed tio tute ne povas signifi, kiel kelkaj asertas, ke tiuj sufiksoj havas pro tio sencon strikte tempa: oni nur ekpensu, ke en tiuj lingvoj oni disponas pri nenia alia rimedo, por ilin nomi; kroma pruvo estas, ke tiuj nomoj estas uzataj egale en la gramatiko de la slavaj lingvoj, en kiuj estas sciata, ke la senco de la verbaj formoj ne estas pure tempa; cetere en la germana parto mem Zamenhof uzis la tiutempe kutimajn latinajn nomojn, el kiuj almenaŭ unu: “perfektum” signifus propre ne la pasinteco, sed la elfiniĝon de la ago!

El tiu tradicia terminaro oni do ne povas prudente tiri konkludon pri la valoro kaj uzado de la participoj en Esperanto (pri la sola escepto en la franca teksto mi parolos en la ĉapitro VI, 1°).*

Jen do la 1a punkto, pri kiu mi petas vian opinion: ĉu vi akceptas ĉi tiun konstaton?

el la kvinlingva Gramatiko oni ne povas tiri ian precizan instruon pri la uzmaniero de la participoj.

* * * * *

Se montriĝos el viaj respondoj, ke la § 6a de la Gramatiko ne sufiĉas, por informi pri la ĝusta uzo de la participoj, ni devas do turni nin al la Ekzercaro. Sed antaŭ ol studi ĝin, ni devas klare precizigi, ke tiu Ekzercaro havas ĝuste la saman valoron de fundamenteco, kiel la Gramatiko. Tion evidentiĝas la Antaŭparolo (*Alineo A 2*); tia cetere estis jam la intenco de Zamenhof, kiam li anoncis la aperon de tiu Ekzercaro per jenaj vortoj: “La “Ekzercaro” donas al ĉiu komencanto... la eblon facile kaj sisteme ellerni nian lingvon... Tiam fariĝi perfekta esperantisto estos jam afero tre facila por ĉiu”. (“Esperantisto”, 15. Sept. 1894.) Kio klare signifas, ke en la opinio de Zamenhof la Ekzercaro liveras *sisteman* prezentadon de la lingvo, kaj ke oni ne estas *perfekta* esperantisto, se oni preteratentas ĝiajn instruojn.

Jen do la 2a punkto, pri kiu mi petas vian opinion:

ĉu la Fundamenta Ekzercaro estas unu el la leĝdonaj dokumentoj pri la uzado de la lingvo?

* * * * *

* *Alian escepton, kiun mi pretervidis, malkovris nia kolego Lapenna, skribante: “En la Fundamenta ruslingva Gramatiko Zamenhof tradukis ‘farata’ per la rusa ‘delaemyj’, kio signifas, ke la ago estas en stato de disvolviĝo. Sekve -ata per si mem neniam povas implici kompletigon de la ago. Por ‘farita’ Zamenhof havis je dispono du pasintajn participojn en la rusa: ‘delannyj’ kaj ‘sdelannyj’. La unua – ‘delannyj’ – indikas nefinitan, nekompletigitan pasivan agon en la pasinteco, do disvolviĝon de la ago mem en la pasinteco. La dua – ‘sdelannyj’ – signifas, ke la ago komplete plenumiĝis. Kompreneble, pro la plenumiteco, la ago mem estas necese ‘pasinta’, kaj tial en la Fundamento, same kiel en la rusa, tiu participo estas nomata ‘pasinta’. Kiel konate, Zamenhof perfekte sciis la rusan kaj, sekve, povis traduki ‘farita’ aŭ per ‘delannyj’ aŭ per ‘sdelannyj’. – Li elektis ‘sdelannyj’, kaj per tio absolute klare difinis la signifon de la pasiva pasinta participo kiel agon, kiu kompletigis.”*

Eble ne estos senutile rimarkigi, ke, ankaŭ ĉe la angla kaj germana tekstoj de la Fundamenta Gramatiko, la sama kontrasto inter la tradukoj de –at (being done/der gemacht wird) kaj de –it (having been done/gemacht – kaj ne: der gemacht wurde!) certigas por la unua la signifon de ago disvolviĝanta kaj por la dua la signifon de la postaga stato. Grava peko kontraŭ la plej elementa klareco kaj kontraŭ la spirito mem de Esperanto, laŭ kiu ĉiu lingv-elemento – radiko, afikso, finaĵo – konservas ĉiam kaj ĉie sian propran signifon, estas do atribui al –at en kelkaj esceptaj okazoj (ekz-e post “estis”) la sencon de –it, kiel faras nia kolego Vilborg (Vidu “esperanto – moderna lingvo” p. 26, 27.) G.W.

V – Esploro de la Ekzercaro pri la formo “estis -ita”.

La unua ekzemplo de pasiva preterito troviĝas en § 12, 19: “*Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua*”. Doni al tiu “estis naskita” la valoron de pluskvamperfekto aŭ antaŭpreterito oni povus nur per hipoteza aldono de ia antaŭa frazo (kiel jena, proponita de unu kolego: “En 1752, li havis samaĝan amikon: Georgo... ktp”). Sed tiaj kompletigaĵoj estas pure arbitraj kaj kontraŭaj al bona scienca metodo. Aliflanke, aserti, ke en tiu frazo “temas pli pri stato ol pri ago”, nenion klarigas, ĉar estas tamen neeble koncepti, ke la naskiĝo tute ne estas ago. En efektiveco, se ni sen antaŭjuĝo konsideras la ĉi-supran frazon, ni konstatas, ke ĝi pure kaj simple esprimas unu pasintan okazaĵon, kaj estas ĝuste paralela al jena frazo: “Georgo Vaŝington mortis en 1799”.

Sekve oni devas konkludi, ke **en tiu frazo la formo “estis naskita” ne estas pluskvamperfekto kaj klariĝas nur laŭ la sistemo Z**. Ĉu vi aprobas tiun konkludon? (Punkto 3a).

* * * * *

La dua ekzemplo troviĝas en § 25, 21: “*Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita*”, sed la ekzemploj de tiu § devas esti ekzamenataj kune, kion ni faros en la ĉapitro VI.

* * * * *

La trian ekzemplon ni trovas en § 33, 7: “*Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita.*” La priparolata momento estas evidente la “tagon, en kiu ktp.”: sed se li malbenas tiun tagon, la kaŭzo estas ĝuste, ke *en* tiu tago – kaj ne antaŭ ĝi – okazis la naskiĝo. Tiel ke **ne povas temi ĉi tie pri la pluskvamperfekto, kaj tiu frazo havas logikan sencon nur laŭ la sistemo Z**. Ĉu vi konsentas? (Punkto 4a).

* * * * *

La kvara ekzemplo troviĝas en § 35, 18: “*La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj.*”

Ŝajne ambaŭ skoloj akordiĝos, ke “kovrita” havas ĉi tie la statan signifon kaj la valoron de adjektivo: **ne temas do pri vera pasivo**. Ĉu vi konsentas? (Punkto 5a).

* * * * *

La kvinan ekzemplon ni trovas en § 39, 11: “*Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin kaj ankaŭ estis mortigita de neniuj; unu tagon, promenante apud la reloĵoj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortigis*”.

Tiu frazo prezentas al ni diversajn manierojn de morto: natura, memfarita, murda kaj akcidenta: estas evidente, ke en ĉiuj tiuj kvar variantoj temas pri unu sama momento. Doni al “esti mortigita de neniuj” la valoron de pluskvamperfekto igus la frazon senseca, kiel montriĝas, se oni eksplicite esprimas tian antaŭtempecon: “Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin kaj ankaŭ estis jam pli frue mortigita de neniuj...”. Aliflanke la suplemento de aganto “de neniuj” nebligas doni al “mortigita” statan signifon.

Restas do, ke en ĉi tiu kvina ekzemplo la formo “**estis mortigita**” ne povas esti pluskvamperfekto kaj ke la frazo havas sencon nur, se oni komprenas ĝin laŭ la sistemo Z. Ĉu vi same opinias? (Punkto 6a).

* * * * *

La sesan kaj lastan ekzemplon ni trovas en § 42, 8: “*El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto...*”

Same kiel en la antaŭa okazo (§ 35, 18), ŝajnas ke “adresita” havas ĉi tie la statan valoron de adjektivo, kaj ke **ne temas do pri vera pasivo**. Ĉu vi konsentas? (Punkto 7a).

* * * * *

Resume, el la 6 ekzemploj de la formo “*estis -ita*”, du (§ 35, 18 kaj § 42, 8) ne estas konsiderindaj, ĉar en ĉiu el ili temas efektive pri stat-participo kaj ne pri vera pasivo; unu (§ 25, 21) ni ekzamenos poste; restas tri ekzemploj (§ 12, 19; § 33, 7 kaj § 39, 11), en kiuj la formo “*estis -ita*” ne povas, laŭ mia opinio, havi la sencon de pluskvamperfekto, kaj kiuj klariĝas nur laŭ la sistemo Z.

Mi konkludas do la unuan parton de mia esploro per la konstato, ke **la sistemo A ne kongruas kun la Ekzercaro**. Ĉu vi same opinias? (Punkto 8a).

* * * * *

VI – Esploro de la Ekzercaro pri la formoj “*est- -ata*”.

La konkludon de la unua parto mi devis tiri el ekzemploj dismetitaj tra la Ekzercaro, kio estas tute natura afero, ĉar demonstri, ke unu formo ne havas ekskluzive la sencon de pluskvamperfekto, ne postulas apartan ĉapitron de lernolibro. Male, al la instruado de la ĝusta uzado de **-ata** Zamenhof ne nur dediĉis tutan duonon de ĉapitro (§ 25), sed eĉ aranĝis tiun instruon en plej rimarkinda maniero, kiel oni vidas, se mi skribos ĝin en du kolumnoj:

1-6	Mi estas, estis, estos, estus amata. Estu, esti amata.	7-12	Vi estas, estis, estos, estus lavita. Estu, esti lavita.
19	Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi.	20	La surtuto estas aĉetita de mi, , sekve ĝi apartenas al mi.
21	Kiam via domo estis konstruata,		mia domo estis jam longe konstruita.
22	Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.	23	Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ.
24	Mia ora ringo ne estus tiel longe serĉata,		se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi.

Kiel oni vidas, tiu tabelo prezentas serion da frazoj, kiuj duope kontrastas unu kun la alia per tio, ke en la maldekstra kolumno ili entenas **at**-participon kaj en la dekstra **it**-participon. Ĉie tie temas

do pri intenca, sistema instruado de la diferenco inter tiuj du sufiksoj en la pasiva konjugacio. Kia do estas tiu instruo?

1) Kontraste kun la kvar ĝin sekvantaj ekzemploj, la unua duopo prezentas formojn de pasiva konjugacio sen kunteksto: la indikon de la diferenco ni devas do serĉi aliloke, t.e. en la malsamaj uzitaj verboj, kies elekto devas helpi al la ĝusta kompreno. Nu, estas facile konstati, ke “ami” esprimas konstantan animdispozicion, dum “lavi” esprimas agon, kiu post pli-malpli longa plenumiĝo lasas post si novan staton (de pureco). La kontraŭmeto de tiuj duspecaj verboj reliefigas diferencon ne inter du momentoj de la tempo, sed evidente inter daŭro kaj rezulto.

Tute saman kontraston montras al ni la sola punkto de la franclingva testo en la 6-a Regulo de la Gramatiko, per kiu ĝi diferencas de la alilingvaj tekstoj: la dua ekzemplo “la pordo estas fermita” kontrastas kun la unua “ŝi estas amata de ĉiuj” ne per malsameco de la tempo (temas ambaŭloke pri estanteco), sed per la elekto de du diversvaloraj verboj: *ami* kaj *fermi*, kapablaj evidentigi la nuancojn de daŭro (*ami*) kaj de rezulto (*fermi*); kaj tiun kontraston Zamenhof klare substrekis per la du parentezoj, kiuj tradukiĝas jene: “*amata* (la afero fariĝas)...*fermita* (la afero estas farita)”.

La unua duopo de la ekzemploj 1-6 kaj 7-12, same kiel la franclingva precizigo de la § 6 de la Gramatiko, **celas do montri, ke oni devas uzi -ata por esprimi daŭran agon, kaj -ita por esprimi la rezultan staton de ago.** Ĉu vi konsentas (Punkto 9a).

* * * * *

2) En la frazoj 21 kaj 24, oni povus unuavide opinii, ke la uzo de **-ata** en la unua subordigita propozicio kaj de **-ita** en la ĉefpropozicio esprimas simple la rilaton de antaŭtempeco al posttempeco. Tia rilato sendube ekzistas, se al ĝi aldoniĝas alia ideo, eĉ pli grava ol la memevidenta tempa rilato.

Pri la frazo 21, se oni konsiderus nur la duan parton, oni povus diri, ke la participo *konstruita* havas la signifon de stato kaj egalvaloras al simpla adjektivo (= preta); sed la kontraŭmeto de *konstruata*, al kiu estas malfacile atribui adjektivan valoron, montras, ke ambaŭ principoj havas signifon de ago, kaj ke la rilato inter tiuj du agoj estas, almenaŭ parte, tempa. Ĉu do temas pri simpla antaŭeco de unu kontraŭ alia en la pasinteco, t.e. pri pluskvamperfekto, kaj ĉu tiu ekzemplo apogas la sistemon A? Al tia interpretado kontraŭstaras du faktoj:

a) la ideo de pluskvamperfekto estas esprimita ne de la sola verba formo “estis konstruita”, kiel postulus la sistemo A, sed de la komplekso “estis **jam longe** konstruita”: kio montras, ke en la penso de Zamenhof, tiu nuda verba formo *povas* esprimi la pluskvamperfektecon, sed *ne sufiĉas* por esprimi ĝin per si mem.

b) se temus pri pura kontraŭmeto de la tempoj de la du agoj, la frazo devus prezenti ĉiun el ili sub la sama angulo, ekz-e “Kiam via domo estis konstruita, mia domo estis jam longe konstruita”. La kontraŭmeto de **konstruata-konstruita** evidente celas komprenigi, ke, en la preparolata momento, la unua domo estis ankoraŭ ne preta, dum la dua estis loĝebla jam de longa tempo: alivorte “estis konstruata” signifas, ke la konstruado plu kaj plu daŭris, dum “estis konstruita” signifas, ke ĝi estis ĝisfine plenumita: **rilato inter daŭro kaj rezulteco**, tute simila al tiu, kiun ni trovis en la duopo 1-6/7-12, kaj **kiu estas klarigebla nur laŭ la sistemo Z.** Ĉu vi samopinias? (Punkto 10a).

* * * * *

3) En la frazo 24, same temas ne tiom pri la tempa rilato inter la agoj *kaŝi* kaj *serĉi* (kio estas evidenta el la senco mem de tiuj verboj), kiom pri la kontrasto inter la longe daŭranta serĉado kaj la

stato rezultinta de la kaŝado: tion montras la kontraŭmeto de la du simetriaĵoj “tiel longe” kaj “tiel lerte”. **La frazo devas do esti komprenata laŭ la sistemo Z.** Ĉu vi konsentas? (Punkto 11a).

* * * * *

4) En la duopoj 19-20 kaj 22-23 ne povas evidente temi pri ia temprilato inter frazoj, kiuj havas inter si nenian sencan rilaton. Tial la paraleleco inter ili klare pruvas, ke temas pri io alia.

En la duopo 19-20 la kontrasto stariĝas inter ripetata (“ĉiam”) aĉetado kaj unufoja aĉeto; en la duopo 22-23 same stariĝas la kontrasto inter la rifuzo de ripetata pagado de (eventualaj) ŝuldoj kaj la unufoja pago de difinita ŝuldo.

Nu, **tia kontrasto inter ripetado kaj unufojeco estas nekonata de la sistemo A, sed konforma al la sistemo Z.** Ĉu vi konsentas? (Punkto 12a).

* * * * *

Resume, la paragrafo 25a estas redaktita kun la nemiskomprenebla intenco instrui, ke la formo “*est- -ata*” esprimas ne momentan, unufojan agon, sed ja daŭran aŭ ripetigantan agadon. Tiel **tiu instruo apogas la sistemon Z kaj kontraŭdiras la sistemon A.** Ĉu vi konsentas? (Punkto 13a).

* * * * *

VII – Konkludo de la nuna esploro.

Se oni respondas per “jes” al la diversaj punktoj de la ĉapitroj V. kaj VI., oni konstatas perfektan kongruecon, kaj tia kongrueco permesas aserti kun certeco, ke **la Fundamenta Ekzercaro, sekve la Fundamento mem klare kaj koherente instruas unu solan sistemon de pasivaj formoj, kaj ke tiu sistemo estas tiu de la skolo Z.**

Pri ĉi tiu fina, 14a punkto mi petas vian opinion.

La Prezidanto,
G. Waringhien.

3. ELTIRAĴOJ EL LA AKADEMIA CIRKULERO N° 77a

Choisy-le-Roi, la 21an de Aprilo 1965.

Estimata Kolego,

.....
6°. La 10an de ĉi tiu monato nia kolego Støp-Bowitz anoncis per cirkulera letero la publikigon kaj la dissendon al la Akademianoj de volumeto “**esperanto – moderna lingvo**”, verkita de la “Akademia Triopo: Setälä, Vilborg, Støp-Bowitz” kun antaŭparolo de W. E. Collinson, kaj prezentanta la vidpunkton de la skolo A, tiel pleniganta sentebelan mankon en la bibliografio de la participa problemo*. Ni esperas, ke ĉiu akademiano ja ricevis tiun cirkuleran leteron kaj tiun

* *Esence ĝi entenas jenajn verkojn:*

a) por la Zamenhofa uzado:

“Plena Gramatiko de Esperanto” de Kalocsay-Waringhien, 3 eldonoj: 1935, 1938, 1964.

“Lingvo kaj Vivo” de Waringhien, 1959.

kolekton de tri disertacioj. Por ebligi al vi la studon de tiuj novaj dokumentoj, ni decidis prokrasti la templimon de la respondoj al la Demandaro aldonita al la Cirkulero n° 76a ĝis la 30a de Junio. Tiamaniere ĉiu kolego, kiu, jam voĉdoninte, dezirus ŝanĝi sian voĉon, provos tion fari sen ia ĝeno.

Altestime vin salutas

G. Waringhien	}	Prezidanto,
W. E. Collinson		Vicprezidantoj,
P. Neergaard		
R. Bernard		Sekretario.

4. ALDONO A. AL LA CIRKULERO N° 77a

Kelkaj kolegoj skribis al mi, okaze de mia Demandaro, por diri sian bedaŭron, surprizon aŭ miron, ke mi malfermis denove la debaton pri la participoj. Ĉar mi havas nenian motivon rezervi al kelkaj miajn klarigojn, mi preferas respondi kolektive.

La antaŭa Prezidanto de nia Akademio deklaris, en sia Cirkulero n° 50a, § 4, ke “tia diskuto estas unu el niaj unuaj taskoj”, kaj konsekvence iniciatis ĝin en la Brusela Kongreso per publika disdonado de flugfolio, en kiu li resumis sian propran teorion.

Post mia elektiĝo, mia unua zorgo devis esti kompreneble la reorganizo de nia Akademio kaj la plibonigo de ĝia Statuto; sed, tion plenuminte, mi ne povis fari alion, ol konduki al fino la entreprenitan studadon de tiu problemo. Cetere ankaŭ en ĉi tiu nova periodo la iniciativo venis ne de mi mem, sed de nia kolego Teo Jung, kiu en du cirkuleraĵoj de la 1.IX.64 kaj de la 15.X.64 donis sian interpretadon de la uzado de la participoj ĉe Zamenhof. Ĉar tiuj liaj leteroj kaŭzis nenian agitadon, mi povis esperi, ke ankaŭ mia Demandaro ĝuos la saman akcepton.

Kaj nun mi miras, ke tiel senpasiie prezentita enketo elvekis tiom da pasioj en kelkaj animoj. Mi tute ne ŝatas polemiki, kaj volas nur diri ĉi tie, ke tian ekstreman ekscitiĝon mi tute ne komprenas. Se la afero estas, kiel oni diversflanke asertas al mi, nur disputo pri bagatelaĵoj, kial aludi pri minacanta katastrofo aŭ skismo? Eĉ se, kiel mi opinias, temas pri principa demando, kial miksi faktojn kun sentoj? “Mi amare scias” skribis nia kolego Butler en sia *Nefermita Letero al s-ro Auld*, “ke per miaj vortoj mi riskas perdi amikojn plej ŝatatajn”. Mi absolute ne vidas, kial kaj kiel amikoj devus malpacigi, ĉar ili malsame interpretas kelkajn frazojn de la Ekzercaro. Pri mi mem, mi volonte deklaras, ke la opinio, kiun miaj kolegoj Cseh aŭ Jung, ekz-e, havas pri la nuna demando, nenion deprenas de la admiro, kiun mi sentas kaj konservas pri la pedagogia genio de la unua, pri la kuraĝa, kaj en certa periodo kuraĝega fideleco de la dua al la afero Esperanta. Mi intencis ataki aŭ ofendi neniun, mi volis nur filologie kaj historie difini la ĝustan sencon de la instruo de la Fundamento. Se, kiel ŝajnas el la ricevitaj respondoj, la plimulto de niaj kolegoj akceptos mian vidpunkton, nek mi nek la Direktoro de la Gramatika Sekcio intencas prezenti la finan voĉdonon kiel la venkon de unua partio super alia. Mi estas profunde konvinkita, ke la rezulton de la nuna enketo oni povos vortigi en pozitiva kaj objektiva maniero, kiu ne aspektu kiel kritiko aŭ kondamno de iu ajn. Kaj mi vive esperas, ke la interpartianoj helpos al ni trovi la plej adekvatan kaj nuancan formuladon. Tute ne estas en mia plano komenci tian kampanjon de ekskomunikado, kiun la

“La Zamenhofa Esperanto – Simpozio pri -ata/-ita”, de 11 aŭtoroj, 1961.

“Ne kiel Meier!” de R. Schwartz, 1964.

“Vojaĝo inter la Tempoj” de Kalocsay, 1966.

b) kontraŭ:

“esperanto – moderna lingvo” de Setälä, Vilborg, Støp-Bowitz, 1965.

“La Esperanta Konjugacio” de Jung, 1965-1966.

Prezidanto Cart faris post la voĉdono de 1922 kontraŭ la partianoj de **-io**. Mi tro bone scias, ke la lastan vorton en ĉiuj lingvaj problemoj diktas la uzado – kaj cetere, se juĝi laŭ la nuna evoluo, mi ne havas motivon por ĝin malfidi.

Atendante do trankvile la finon de la nova limtempo, mi esperas, ke ĉiuj rememoros la belajn vortojn, kiujn mia antaŭirinto kaj kolego Isbrucker skribis pri ĉi tiu diskuto en sia Cirkulero n° 49a: “La temo estas pure lingva... Mi nepre deziras, ke la spirito restu sur alta kaj amika nivelo. Mi estas certa, ke mi povos kalkuli je via kunsento kaj via subteno, por teni la diskutojn en la altaj regionoj de la harmonio kaj de Esperantista samideaneco.”

La Prezidanto.

5. ALDONO B. AL LA CIRKULERO N° 77°

Klariginte ĉi-supre mian agadon kiel Prezidanto, oni eble permesos al mi diri, kiel simpla akademiano, mian opinion pri la interpretoj, kiujn la “Akademia Triopo” donis de la Fundamentaj tekstoj.

Mi volas antaŭe fari du rimarkojn:

unue: nek en la paragrafoj de la “Plena Gramatiko” pri la participoj, nek en mia Demandaro mi eĉ unu fojon uzis la vorton “aspekto”: senutila estas do ĉia protesto kontraŭ la “enkonduko de aspektoj en nian konjugacion”. La uzadon de Zamenhof kaj en la Fundamento kaj en lia Verkaro oni povas tute kontentige klarigi per la tre simpla difino, kiun li mem donis al Beaufront (“Lingvaj Respondoj”, 6a eldono, n° 109), ke **-ata** entenas ĉiam ideon pri la disvolviĝado de la ago, **-ita** pri ties rezulto.

due: daŭro kaj plenumiteco, same kiel la aliaj fazoj de ago-evoluo, ankaŭ apartenas al la kategorio de la tempo. Se la atistoj volus precize nomi sian teorion, ili devus diri, ke al la participaj sufiksoj ili donas nur tempopunktan valoron. Sed ĝuste en tio ilia teorio kontraŭdiras la propran valoron de la participoj, tian, kian ni vidas en la memstara, epiteta uzado: *bakata pano* diferencas disde *bakita pano*, *konstruata domo* disde *konstruita domo* ne tiom per rilato al “la priparolata momento” (kie ĝi estas ekz-e en la frazo: “Dimanĉe infanoj ludadis en la konstruata domo”?), kiom per rilato al la nefiniteco aŭ preteco de la objekto. La analogio igas neevitebla, ke tiun signifon ili konservu ĉie en la konjugacio – kaj ĝuste la historio de nia lingvo tion konfirmas: pli ol 80 % el la tekstoj publikigitaj en la kvin lastaj jaroj observas la zamenhofan uzadon.

La kuraĝa provo de niaj tri kolegoj demonstri, ke ankaŭ la atisma teorio povas pretendi la zamenhofecon kaj la fundamentecon, konvinkos nur la jam konvinkitajn. Ĝi malsukcesis same ĉe la du partoj de mia Demandaro:

I. – En la tri kernaj frazoj de la Ekzercaro (§ 12, 19 - § 25, 21 - § 33, 7) ili kapablis doni al la formo “*estis -ita*” sencon de antaŭtempeco nur per trudado de nenatura interpreto. Pri Georgo Vaŝington, ekz-e, nia kolego Isbrucker elpensis al tiu granda homo “samaĝan amikon”, pri kies ekzisto oni supozeble “parolus en 1752”; dum nia kolego Vilborg asertas, ke por ĝuste kaj korekte paroli pri la dato de ies naskiĝo, oni devas antaŭe scii, ĉu tiu persono estas ankoraŭ vivanta aŭ ne.

Same pri la frazo de la malfeliĉa onklo, ĉe kiu nia kolego Vilborg estas devigata supozi, ke “mortis” estas ankaŭ pluskvamperfekto kaj klariĝas nur per la subkompreno de ia antaŭmetita tempopunkto: “Estis en la jaro 1875. Onklo Ferdinando ne vivis plu. Mia onklo ktp...” Nu, per tia metodo de arbitre subkomprenitaj frazoj oni facile povas demonstri ĉion, eĉ ke la fama onklo estas ankoraŭ en la limboj (sufiĉus subkompreni: “Mediumo antaŭdiris al mi, ke en la jaro 2975 iu skribos: mia onklo ktp...”).

La tria frazo estas eĉ pli ĝena por la atistoj, ĉar ĝi precize mencias la tempopunkton, je kiu io okazis (“... la tagon, en kiu li estis naskita”). Por elturniĝi el tiu kaptilo, nia kolego Setälä asertas, ke “sana prudento akceptas, ke malfeliĉon ne povas kaŭzi la okazo de naskiĝo mem, nur la vivo, kiu sekvis”, kaj ke “tiuj malfeliĉoj ja komenciĝis nur, kiam li estis naskita, t.e. post la okazo”. Li simple preteratentas, ke ankaŭ al nenia “sana prudento” iam venus la ideo “malbeni tagon”, kaj ke la frazon klarigas nur la antikva kaj ankoraŭ nun vegetanta kredo astrologia, laŭ kiu ne nur la tago mem, sed la ĝusta horo de la eluteriĝo de homo antaŭdeterminas ties tutan vivon (Kp Ijob III, 3 – kie li povos konstati, ke por Zamenhof “estis naskita” kaj “naskiĝis” estas ĝuste sinonimaj). Siaflanke, nia kolego Vilborg, kiu klarigas la partupon per antaŭtempeco, konsideras tute certa, ke la aktivigo: “li malbenis la tagon, en kiu lia patrino naskis lin” bone redonas la sencon de la frazo: sed kiu do, krom por la bezonoj de apriora teorio, vidus en ĉi tiu “naskis” ian pluskvamperfekton?

Jen al kiaj fortostreĉoj de sia imago kondamnas sin tiuj, kiuj ne volas akcepti simplan tekston en ĝia natura senco, kaj anticipe decidis perforte enirigi ĝin en aprioran teorion. La vero estas, ke al ĉiu senantaŭjuĝa spirito la formoj “*estis -ita*” en tiuj tri frazoj aperas kiel simplaj pasivaj preteritoj; tion cetere agnoskis interpartianaj lingvistoj, kiel nia kolego D-ro Collinson kaj nia ekskolego D-ro Manders.

II. – En la parto de la § 25a klare dediĉita al la distingo inter **-ata** kaj **-ita**, niaj tri kolegoj asertas, ke neniuj el la tieaj frazoj estas en konflikto kun la tempopunkta sistemo, kaj mi tre volonte konsentas kun ili. Sed ne pri tio sole estas la demando. Ili forgesas, ke teorio estas plenalora nur, se ĝi klarigas *ĉiujn* aspektojn de la fenomeno.

Nu, la koncerna paragrafo prezentas al ni kvar duopojn da frazoj, kaj en ĉiu el tiuj kvar duopoj senmanke enestas ĉe la **ata**-frazoj la nuanco de daŭro-ripetiĝo kaj ĉe la **ita**-frazoj la nuanco de finiteco-definitiveco: ĉu tiel okulfrapa insistado ŝuldiĝas nur al okaza koincido? Kiu do kredus, ke inteligenta homo, kiel sendube estis Zamenhof, por klarigi la “nete tempan signifon” de la participoj, estus elpensinta nur frazojn, kiuj ĉiuj reliefigas alian signifon? Kial do, ekz-e, anstataŭ kontrastigi la definitivan pagon de unu ŝuldo al unu persono difinita kun la nepagado de eventualaj ŝuldoj al diversaj personoj, li ne uzis unu el la tipaj frazoj karakterizaj de la atismaj demonstracioj: “Je la 10a mia ŝuldo estis pagota, je la 11a ĝi estis pagata, je la 12a ĝi estis pagita”? Se tion li ne faris, li do celis demonstri ion alian.

Kiel pli simple estus konfesi, kiel D-ro Manders en sia grava artikolo-recenzo, afable dissendita de la Prezidanto Isbrucker al ĉiuj akademianoj: **“Pri la zamenhofeco de la itismo mi ne plu kuraĝas dubi: ne nur la Fundamento, sed ankaŭ la tuta verkaro de Zamenhof atestas pri tio!”**.

G. Waringhien.

6.

La rezultojn de la voĉdono registris la Cirkulero N° 79a de la 27. Julio 1965.

En la tempo de la voĉdonado, la nombro de la akademianoj estis 46, la nombro de la voĉdonintoj 33, do supera al la du trionoj de la membroj. La necesa plimulto estis do 17. Pri la dekkvar punktoj respondis:

- jese** **24** (*Albault, Atanasov, Auld, Baghy, Bernard, Conterno, Dalmau, Domingues, Downes, Gregor, Hodakowski, de Hoog, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Neergaard, Obruĉev, Pumpr, Rakuša, Régulo Pérez, Rotkviĉ, Szilágyi, Waringhien*).
- nee** **4** (*Rosbach, Solzbacher, Støp-Bowitz, Vilborg*).
- mikse** **2** (*Butler: ne pri la punkto 14a, senresponde pri la aliaj; Collinson: jes pri la 1a, 5a kaj 6a punktoj; ne pri la 4a, 12a, 13a kaj 14a; sindetene pri la ceteraj*).
- sindetene** **3** (*Faulhaber, Kawasaki, Krestanov*).

Krome rifuzis partopreni en la voĉdonado 10 (Bugge-Paulsen, Cseh, Haferkorn, Isbrucker, Jung, Lippmann, Pragano, Setälä per kolektiva deklaro; Söderberg kaj Bokarev per apartaj leteroj). Ne respondis 3 (Ossaka, Sevak kaj Wong Kenn).

La Prezidanto komentis jene tiujn rezultojn:

Oni vidas, ke la enketo ne estis senutila, sed alportis pozitivan rezulton: la Akademio povis fine, per plimulto el 7 voĉoj, esprimi sian opinion, ke **la Fundamento entenas klaran instruon pri la uzado de la participoj, kaj ke tiu uzado estas konforma ne al la kutimoj de la skolo A** (tiel dirita “atismo”), **sed ja al la kutimoj de la skolo Z** (tiel dirita “itismo”). De nun la Esperantistaro disponas do oficialan interpretadon de la Fundamento pri tiu punkto.

Restas dua etapo, doni praktikan formuladon de tiu fundamenta kaj zamenhofa uzado. Tiucele, laŭ la artikolo 14a de la Statuto, mi nun transdonas la dosieron de la afero al la Direktoro de la Gramatika Sekcio, petante lin ellabori, sur la bazo de la reguloj donitaj de Zamenhof al Beaufront kaj kun la konsidero de la rimarkoj faritaj de niaj kolegoj dum ĉi tiu enketo, voĉdonotan tekston, kiu prezentu, en senpartia formo kaj ekster ĉia teorio aŭ sistemo, la principojn de la fundamenta kaj zamenhofa uzado de la participoj, ĉu en epiteta, ĉu en apudverba uzado. Oni tiam klare vidos, ke neniam temis, kiel kelkaj kolegoj timas, pri enkonduko de aspekteco en la Esperantan konjugacion, sed pri la difino de la ĝusta valoro de la participaj sufiksoj.

Estas cetere espereble, ke la tri kolegoj Bokarev, Butler kaj Solzbacher, kiuj aludis al ebleco de neŭtrala vidpunkto en tiu demando, sed bedaŭrinde ne havis ĝis nun la tempon ĝin detale klarigi, bonvolos komuniki al la Direktoro de la Gramatika Sekcio siajn proponojn pri nuanca kaj sufiĉe elasta formulado de la koncerna teksto.

Sekve de tiu decido, la Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko verkis Raporton, pri kiu li petis, konforme al la artikolo 14a, la opiniojn de la sekcianoj: el la 8 ĝin akceptis 5 (Albault, Gregor, Lapenna, Pumpr, Régulo Pérez), ne respondis 3 (de Hoog, Rosbach, Sevak). La voĉdonado pri tiu Raporto havis por templimo la 1an de Julio 1966.

Vitry, la 15an de Aprilo 1966.

RAPORTO DE LA DIREKTORO
(Sekcio pri Gramatiko)

Sinjoro Prezidanto!

1. Pri la *ata-ita* problemoj ekzistas dokumento, kiu povas esti rigardata kiel la esprimo de la vidpunkto de Zamenhof, kaj kiu tial estas aŭtoritata. Estas la merito de niaj kolegoj Krestanov kaj La Colla, ke ili la unuaj atentigis pri la tiu-rilata signifo de la verko de L. de Beaufront “Commentaire sur la Grammaire Esperanto”*: ĝi efektive apartenas al la “Kolekto Esperanta aprobita de D-ro Zamenhof”, t.e. laŭ Zamenhof mem (vidu “Fundamento”, Antaŭparolo 5-2) al tiuj verkoj “eldonitaj... sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo”. Ekzistas plie pri la koncerna parto de la “Commentaire” la atesto de nia iama kolego D-ro Pierre Corret pri la konfirmo, skribita al li de S-ro de Beaufront en Marto 1933, ke tiu parto de la *Commentaire* “estis rekte inspirita de Zamenhof”. Tiu ĉi do sendube aŭtoritata verko resumas la regulojn pri la uzado de **-ata** kaj **-ita** jene (Kp cetere en “Lingvaj respondoj”, eld. 1962: n-rojn 109/110):

“Uzu a t a, se la ago estas efektiviĝanta rilate al la tempo, pri kiu temas.

Ekz-e: *Mi estas amata* (nun). *Mi estis amata* (tiam). *Mi estos amata* (en la tempo, pri kiu mi parolas aŭ pensas).

La ago estas, estis aŭ estos nuna rilate al la tempo, pri tiu temas.

Uzu i t a, se la ago efektiviĝis pli frue, ol la tempo, pri kiu temas.

Ekz-e: *Mi estas vestita de du horoj*. *Mi estis vestita de du horoj*. *Mi estas certa, ke mi estos vestita du horojn pli frue, ol vi*.

La agon oni estas, estis aŭ estos plenuminta antaŭ la koncerna tempo, antaŭ la du horoj, pri kiuj temas.

R i m a r k o – Se oni konsideras nur la efektivigitan faron, la rezulton de la ago kaj ne ĝian disvolviĝadon, oni uzas ita.

Ekz-e: *Morgaŭ mi estos akceptita de la reĝo*. *Tiu libro estos presita en Parizo*. Mi konsideras nur unu aferon, tio estas, ke el la ago montrita de la du verboj rezultos, en la unua ekzemplo, homo *akceptita*; kaj en la dua, libro *presita*.

Sed se mi konsiderus la agon mem en ĝia plenumiĝado, en la kondiĉoj, en kiuj ĝi malvolviĝas, malvolviĝis aŭ malvolviĝos en la tempo, pri kiu mi parolas, mi uzus *ata*, tial ke en tia okazo la ideo de tempo estus la pli grava, kaj temus ja efektive pri nuntempo rilate al la koncerna tempo.

Ekz-e: *Se mia amiko estus kuracata de tiu kuracisto, li certe resaniĝus*. *Li estos akceptata kun la plej grandaj honoroj: la ceremonio daŭros almenaŭ du horojn*. *Li estos nomata Petro*.

En ĉi tiu lasta ekzemplo, mi komprenas, ke li havos konstante la nomon Petro, aŭ almenaŭ dum la daŭro de difinita tempo. Sed, se mi volus aludi la nedaŭran okazon, per kiu ĉe la bapto li ricevos la nomon Petro, mi dirus: *Li estos nomita Petro*.

* “Komentario pri la Gramatiko de Esperanto”: teksto senŝanĝa en la 5 eldonoj.

Resume, a t a ĉiam entenas ideon pri ioma daŭro de efektivigo de la ago, kiun oni rigardas kiel nunan en ĝia modo aŭ tempo.

Male, i t a ĉiam entenas ideon pri nedaŭra ago, ĉe kiu oni atentis nur la plenumitan agon, la rezulton. Ĉi tiu formo montras ankaŭ la antaŭecon de la ago, se oni komparas ĝian tempon kun la tempo de alia ago.”

(Tradukita el la franca lingvo)*

2. La Esperantaj literaturo kaj gazetaro, same kiel la Esperante elsendantaj radiostacioj, uzas la participojn nur laŭ la ĉi-supre klarigita maniero.

Ŝajnas evidenta, ke la “itismaj” formoj regas en la aktuala lingvouzo.

3. En enketo antaŭ nelonge plenumita pri la uzado de la participoj en la “Fundamenta Ekzercaro”, pli ol 50 % el la Akademianoj voĉdonis POR tio, ke Zamenhof uzis ilin en tiu lernolibro *itisme*, kaj nur 12 % neis tion.

La ĉi-supre citita instruo de Zamenhof, la fakta lingvouzado de la plimulto de la esperantistoj kaj la interpreto pri la uzado de la participoj en la Fundamento, aprobita de la plimulto de la Akademio, venigas min al la konkludo, ke la Akademio devas nun publike komuniki la decidon faritan sur tiu ĉi bazo.

Mi sekve havas la honoron proponi al la voĉdono de la Akademio jenan rezolucion, kiu, se akceptita, estos poste publikigita.

REZOLUCIO

La Akademio, aprobe konsiderinte la konkludojn de la Enketo de la Prezidanto pri la signifo de la ekzemploj de pasivaj verboformoj en la Fundamento;

atentante la Raporton de la Direktoro de la Gramatika Sekcio, decidas oficialigi jenajn principajn regulojn:

1°- La Esperanta konjugacio konsistas nur el tri verbotempoj: la estanta (aŭ as-tempo, aŭ prezenco), la estinta (aŭ is-tempo, aŭ preterito) kaj la estonta (aŭ os-tempo, aŭ futuro).

2°- Ĉiuj aliaj temporilatoj, kiel ekzemple la antaŭpreterito, la antaŭfuturo, ktp., estas esprimataj per adverboj, konjunkcioj, aŭ simple per la kunteksto.

3°- La ses participoj, uzataj aŭ apud substantivo (resp. pronomo) aŭ apud la verbo “esti”, montras, en kia fazo de la ago troviĝas la subjekto, respektive la objekto: aŭ komencita kaj ne finita (-ant, -at), aŭ finita kaj plenumita (-int, -it), aŭ ankoraŭ ne komencita sed intencata aŭ atendebla (-ont, -ot).

4°- Sekve la formoj “estas, estis, estos, estus, estu, esti -ata” insistas pri la daŭro aŭ ripetiĝo de la ago; kaj la formoj “estas, estis, estos, estus, estu, esti -ita” insistas pri la rezulto de la ago. La formoj kun “-ita” povas ankaŭ montri la antaŭtempecon en la okazo, se en la frazo estas tiurilata aparta indiko.

Al tiu ĉi Rezolucio la Akademio deziras aldoni jenon: ĉar ĝis nun ne ekzistis ia oficiala difino por la uzado de la pasivaj participoj, la opinioj pri tiu temo estis kompreneble diversaj, kaj oni ne

* Ni penis reprodukti kiel eble plej fidele la tipografion de la originalo. G.W.

devas interpreti la nunan oficialigon kiel kondamnon de tiuj esperantistoj, kiuj alprenis la starpunkton uzi la pasivajn participojn laŭ la tiel nomata “nete tempa sistemo”. Tial la Akademio rekomendas eviti pliajn diskutojn pri tiu temo, kaj esperas ke oni en harmonio lasos al la praktika uzado, kiu en ĉiu vivanta lingvo estas la sole fakta definitiva instanco, restarigi ankaŭ sur tiu ĉi punkto, laŭ la vortoj de Zamenhof, “**tiun severan unuecon, kiu por lingvo estas multe pli necesa, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco.**”

La Direktoro,
D. B. Gregor.

8.

La rezultojn de la voĉdono pri tiu Rezolucio registris la Cirkulero N° 84a de la 10. Novembro 1966. En la tempo de la voĉdonado, la nombro de la akademianoj estis 43, la nombro de la voĉdonintoj 24, do malsupera al la du trionoj de la membroj. La necesa plimulto, en tiu okazo (Art. 16 de la Statuto) estis do 22. Respondis:

jese **21** (*Albault, Atanasov, Auld, Bernard, Conterno, Domingues, Gregor, Hodakowski, de Hoog, Kalocsay, Krestanov, Lapenna, Nakamura, Neergaard, Pumpr, Rakuša, Régulo Pérez, Rotkvič, Sevak, Szilágyi, Waringhien*).

nee **2** (*Butler, Haferkorn*).

sindetene **1** (*Downes*).

Krome, kolektive rifuzis partopreni en la voĉdonado 6 (Faulhaber, Jung, Lippmann, Setälä, Støp-Bowitz, Vilborg). Ne respondis 13 (Baghy, Bokarev, Bugge-Paulsen, Collinson, Cseh, Isbrucker, Kawasaki, Ossaka, Pragano, Rosbach, Söderberg, Solzbacher, Wong Kenn).

La Rezolucio ne estis akceptita. La diferenco inter ĉi tiu voĉdono kaj la antaŭa venas de du kaŭzoj: a) intertempe mortis tri akademianoj fidelaj al la Zamenhofa uzado: Dalmau, La Colla kaj Obruĉev. b) la ses ĉi-supre montritaj kolegoj faris kampanjon por la nerispondado: kvankam tiu taktiko estas kontraŭa al la spirito de la Statuto (vidu la artikolon 18), ĝi havis la avantaĝon aldoni al la grupo de la intencaj nerispondantoj la kolegojn, kiuj pro malsano aŭ alia motivo preterlasis respondon aŭ kutimas ne voĉdoni. Se, anstataŭ rifuĝi en tiu procedura artifiko, la 6 iniciatintoj de tiu kampanjo estus voĉdonintaj ne, konforme al sia konvinko, la cifero de la du trionoj (29) estus superita, la necesa plimulto estus 15 kaj la Rezolucio estus aprobita. La neakcepton de la Rezolucio estus do neĝuste interpreti kiel definitivitan forĵeton de la Zamenhofa sistemo. Intertempe 16 akademianoj (Butler, Collinson, Cseh, Downes, Faulhaber, Haferkorn, Isbrucker, Jung, Lippmann, Pragano, Rosbach, Setälä, Söderberg, Støp-Bowitz, Vilborg, Wong Kenn) estis proponintaj formulon de “provizora kompromiso” kaj postulis, ke la Prezidanto voĉdonigu pri ĝi la Akademion. Al tio la Prezidanto respondis, fine de la sama Cirkulero:

Tion mi ne faros, ĉar la utilecon de tia “kompromiso” mi absolute ne vidas.

Mi memorigas al niaj kolegoj, ke la levon de la nuna demando motivis la bezono de *normo*, laŭ kiu redakti la oficialajn tekstojn kaj decidi eventuale inter la du eblaj signifoj, kiujn la uzo de **-ata** povas estigi en juraj, komercaj, diplomaciaj ktp dokumentoj. Nenia nigra-blanka rezolucio povus doni praktikan solvon al tiu demando. Eĉ se supozu ĝin tute neŭtrale redaktita, ĝin ĉiu partio interpretus kiel la oficialigon de sia propra sistemo – kaj kian ŝanĝon tio alportus al la nuna situacio?

Sed neŭtrale redaktita la proponita kompromiso ja ne estas: sufiĉas legi la nomojn de la subskribintoj. Se oni volus lojale prezenti la “regulon de Beaufront” (“aprobita kaj eldonita *sub la persona kontrolo kaj kunhelpo*” de Zamenhof, tion ni ne forgesu), oni ne elektu arbitre el la kvar egale graslitere presitaj paragrafoj nur la tri unuajn, al kiuj estas eble doni “nete tempa” interpreton

forigante la kvaran, kiu ja klarigas la esencan signifon de la “estanta” kaj “estinta” pasivaj participoj: “**Ata** ĉiam entenas ideon pri ioma *daŭro* de efektiviĝo de la ago, kiun oni rigardas kiel nunan en ĝia modo aŭ tempo. Male **Ita** ĉiam entenas ideon pri nedaŭra (¹) ago, ĉe kiu oni atentis nur la *plenumitan agon*, la *rezulton*.” Kaj ĝuste tiu kvara paragrafo koincidas kun la regulo publike donita en 1932, antaŭ la Pariza Universala Kongreso, de la tiama Direktoro de la Gramatika Sekcio, D-ro Lippmann: “Ne estas malfacile trovi la ĝustan formon: ĝi rezultas el la simpla konstato de la efektiva daŭro de la ago (**-ata**, se daŭranta, **-ita**, se finita)”. (Oficiala Raportaro, p. 91). Al ĉi tiu minimuma formulo (se nur sub la daŭro oni komprenas ankaŭ la ripetiĝon) povus ja reduktiĝi la tuta Zamenhofa uzado. Sed ĉu nia kolego Lippmann subskribus ĝin ankoraŭ nun?

9. ELTIRAĴOJ EL LA AKADEMIA CIRKULERO N° 90a.

Vitry, la 1an de Oktobro 1967.

...Unu alian gravan problemon pri la pasivaj participoj ni ja elmetis al la esplorado de la Akademio per niaj Cirkuleroj n° 76, 79, 82 kaj 84; sekve de la neakcepto de la proponita Rezolucio, la demando estis laŭstatute resendita al la Sekcio pri Gramatiko por plua pristudo.

Sed de tiu tempo la Prezidanto ricevis de du grandaj naciaj Asocioj – la franca kaj la germana, de unua faka Asocio de Instruistoj – la germana, kaj fine de la internacia Komitato de UEA rezoluciojn, petantajn de la Akademio rapidan kaj definitivan solvon de tiu demando, kio interalie pruvas, ke la pozicio de la Estraro en la supre cititaj Cirkuleroj respondas al la tre ĝenerala opinio de la esperantistaro. La valoro de la motivoj formulitaj en tiuj rezolucioj (kies tekston vi trovos ĉi-sube) kaj la reprezenta kapablo de ĝiaj voĉdonintoj devigas nin tuj elmeti denove antaŭ vi la koncernan demandon, ne cedante al la kontraŭa rezolucio de la Norvega Ligo (15. Majo 1967), kiu “admonas serioze al la Akademio de E-o *ne* alpreni decidon en la participa demando por unu el la du interpretoj kaj kontraŭ la alia, sed lasi la solvon al la natura, libera evoluo de la lingvo”, kun la motivaĵo, ke “oficiala decido por unu el la du interpretoj povos malhelpi la enkondukon de E-o kiel facila internacia lingvo en la lernejojn de iuj landoj, kaj eĉ krei danĝeran skismon en nia movado”.

Ni efektive opinias, ke ĉe scienca esplorado kaj objektiva diskutado ne estas konvene paroli pri skismo kaj ke tiaspecaj minacoj ne povas esti utilaj kaj helpaj por trankvila laborado de la Akademio; sed precipe la unuan argumenton ni rigardas refutita de la sinteno de la Esperanto-Unuiĝo de la Germanaj Instruistoj, kiuj pro sia profesio mem estas pli kompetentaj juĝi pri la instrueleco de nia lingvo en ĝermanlingvaj landoj, ol la nefakaj norvegaj kongresanoj, kaj kiuj esprimis sian aliĝon al la Zamenhofa particip-uzado.

Cetere alia grava afero instigas nin urĝi la Akademion al rapida kaj definitiva solvo de tiu demando. En somero de la nuna jaro nia kolego E. Vilborg eldonis la unuan numeron de “Interlingvistika cirkulero”, sub la titolo FOKUSO; ĝi estas destinita starigi “kontakton intersisteman”, kaj estas senpage sendata al ĉiuj Akademianoj, “al aliaj eminentaj esperantologoj kaj al kelkaj konataj interlingvistoj reprezentantaj aliajn sistemojn”, krome al la ekspluatataj periodaĵoj, i.a. al “Cosmoglotta” kaj al “Rivista de Interlingua”, du gazetoj, kiuj konstante atakas kaj misprezantas nian lingvon. Ne estas kontesteble, ke la tie presita bibliografio kaj la analizo de du novaj projektoj povas utili al interlingvistoj, kaj ke la iniciativo de nia kolego havas sciencon

¹ Oni povus traduki ankaŭ: transira.

intereson. Sed tiun unuan numeron li inaŭguris per polemika artikolo “La participa demando ree aktuala”, en kiu li klare elmetas la fakton, ke unu sama frazo Esperanta povas havi unu signifon por atisto kaj alian malsaman por itisto. Sendube kun la plej bonaj intencoj nia kolego tiel metas en la manojn de niaj kontraŭuloj plej danĝeran batalilon: ĉar ĉiufoje, kiam niaj propagandistoj provos atingi de iu nacia aŭ internacia instanco enkondukon de Esperanto en iun fakon, instruan aŭ alian, ili de nun frontos anon de Interlingue aŭ de Interlingua, kiu, kun tiu cirkulero en la mano, facile pruvos al la koncernata instanco ke Esperanto ne estas akceptebla kiel internacia lingvo, ĉar ĝi malhavas la plej bezonatan klarecon kaj allasas por unu sama frazo du malsamajn sencojn, kio povus okazigi en la diplomaciaj, juraj ktp. tekstoj senrimedajn konfuzojn. Tiun grandan kaj jam de nun minacantan danĝeron ni povos eviti sole nur, se ni kapablos respondi al tiuj konkurantoj “Ne, tio plu ne estas vera, ĉar la Akademio decidis!”.

* * * * *

Jen nun la ĉi-supre aluditaj dokumentoj:

1) *Union Française pour l'Espéranto (U.F.E.)*

Parizo, la 17-an de Majo 1967.

Estimataj gesinjoroj Akademianoj,

Kiel oficiala organizaĵo de la franca esperantistaro ni havas la honoron turni nin al vi, kiel al la plej alta instanco en Esperanto-lingvaj demandoj, por peti de vi oficialan decidon en la sekvanta afero.

Antaŭ nelonge, kaj por certiĝi pri la klareco de nia lingvo post la konataj partikipdiskutoj, nia Unuiĝo submetis al la paralela Asocio en Germanujo kvar testofrazojn, kiujn vi trovos ĉi-kune.

El nia enketo montriĝis, ke la estraro de Germana Esperanto-Asocio sin deklaris nekompetenta por respondi pri la senco de la kvar frazoj kaj, sekve, nekapabla doni oficialan opinion. Ni rimarkigas, *ke la diritaj frazoj estas kiel eble plej kompletaj en si mem kaj tre simplaj.*

Per letero, ne oficiala, nur privata, la Prezidanto de G.E.A. informis nin, ke li tute ne akordas kun ni pri la senco de la kvar frazoj. La Vic-Prezidanto de GEA skribis, ke ambaŭ sencoj estas ĝustaj “*depende de tio, ĉu oni estas atisto aŭ itisto*”.

Estas evidente, ke propagandi tian lingvon, en kiu la samaj vortoj ne havas la saman sencon por ĉiuj, povus fariĝi – almenaŭ en Francujo – malfacila entrepreno. Pro tio, kaj por orienti nian estontan agadon sur la Esperanta kampo, ni petas vin insiste, ke vi bonvolu diri al ni, kiu el la du sencoj atribueblaj al ĉiu el la kvar frazoj estas *konforma al la lingvouzo kaj kutimo de D-ro Zamenhof.*

Ni estos tre dankaj al vi, se vi bonvolos konigi vian decidon kiel eble plej baldaŭ.

Kun sinceraj salutoj,

R.Llech-Walter, Prezidanto.

2) *Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer*

Hannover, 16.6.67.

Estimata Sinjoro Profesoro!

La Estraro de Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) havas la honoron informi vin, ke ĝi akceptis en sia kunsido de la 5.3.1967 Rezolucion, en kiu ĝi deklaris sin fidela al la

Zamenhofa Esperanto. La tekston de tiu Rezolucio oni povas legi en la maja numero de “Germana Esperanto-Revuo”.

La Estraro de nia Germana Esperanto-Asocio ricevis de siaj francaj kolegoj kvar testofrazojn, kiujn ĝi estis petita interpreti. La estraro respondis al la francaj kolegoj, ke ĝi estas konvinkita, ke neniu el la organoj de GEA estas kompetenta decidi pri tio.

Ĉar ankaŭ ni opinias, ke ne estas nia tasko fari decidojn en pure lingvaj demandoj, ni turnas nin al la Akademio de Esperanto, kiun ni kredas la sola instanco, kiu povas doni klarecon al la afero. Ni petas vin, ke vi bonvolu komuniki al ni kaj al la Esperanta publiko, kia estas la senco de la kvar testofrazoj. Ni devas aldoni, ke ni ne deziras ricevi la opinion de tiu aŭ alia Akademiano, sed nur la sencion, kiun la frazoj havas laŭ la Zamenhofa lingvouzo, kiun ni rigardas norma por Esperanto.

Ni kredas, ke, same kiel ni mem, la Esperanta publiko atendas de la Akademio la baldaŭan decidon en tiu demando.

Ni petas vin, Sinjoro Profesoro, akcepti la esprimon de nia alta estimo.

Por la estraro de EUGI

Heinrich Müller, Prezidanto.

3) *Deutscher Esperanto-Bund*

Nürnberg, 20.7.1967.

Estimata s-ro prof. Waringhien,

La jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio, kiu okazis pentekoste en Hamburgo, diskutis laŭ propono de la estraro de la Sarlanda Esperanto-Ligo pri akcepto de rezolucio, en kiu la jarĉefkunveno sin deklaru fidela al la Zamenhofa Esperanto.

La jarĉefkunveno konstatis kaj decidis, ke ĝi ne estas kompetenta decidi pri lingvaj aferoj, kaj komisiis la estraron de GEA transdoni al la Akademio jenan deziron:

“La jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio esprimas sian deziron, peti la Akademion de Esperanto, science esplori kaj solvi la problemon de pasivaj participoj laŭ Zamenhof.”

Kun sinceraj salutoj,

D-ro W. Bormann, Prezidanto,

L. Pickel, Ĝenerala Sekretario.

4) *Universala Esperanto-Asocio*

Eltiraĵo el la Protokolo de la Komitatkunsido, la 4-an de Aŭgusto 1967 en Roterdamo (ĉapitro 14, Ĝenerala trarigardo):

“La Prezidanto tute apogas la proponon..., ke oni transdonu la aferon de la participoj al la Akademio kun la peto, ke ĝi solvu la demandon kiel eble plej baldaŭ. Tiu ĉi propono estas *unanime* akceptita de la Komitato.

“Plue la Prezidanto proponas, ke la Komitato rekomendu al ĉiuj landaj asocioj ne publikigi en siaj respektivaj organoj kion ajn pri tiu demando, kaj same tiel ke ankaŭ estu farita rekomendo al la gazetoj, kiuj ne apartenas al UEA aŭ al la landaj asocioj aŭ fakaj organizaĵoj ne ligitaj al UEA, ke ankaŭ ili respektu tiun rekomendon de la Komitato kaj ne aperigu kion ajn pli pri tiu demando de la participoj. La Komitato akceptas *unanime* ankaŭ tiun proponon.”

* * * * *

Konforme al la deziroj tiel esprimitaj, ni komunikas al vi la kvar testofrazojn, petante vin voĉdone elekti el la po du proponitaj sencoj tiu, **kiu estas konforma al la lingvouzo de D-ro Zamenhof**. Poste, surbaze de la ricevitaĵoj respondoj, ni petos de la Direktoro de la Gramatika Sekcio novan formuladon de la valoro de la pasivaj participoj kaj ĝin submetos al via voĉdono. Ni esperas, ke en tiuj du voĉdonoj ĉiu Akademiano kuraĝos eldiri klare sian opinion, kaj ne rifuĝos eviteme en facila nerespondeco.

Kun nia altestima saluto,

G. Waringhien	Prezidanto,
P. Neergard	} Vicprezidantoj,
A. Atanasov	
R. Bernard	Sekretario.

TESTOFRAZOJ

1 - *“Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970.”*

= Do la garantiantoj estos kvitaj,

A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon de la domoj detruitaj....

B) Nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

2 - *“Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo.”*

= A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3 - *“Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon.”*

= A) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de de la aŭtomobilo;

B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon de la aŭtomobilo.

4 - *“Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio.”*

= A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

10. ELTIRAĴOJ EL LA AKADEMIA CIRKULERO N° 91

Vitry, la 23an de Novembro 1967.

... Okaze de la voĉdono aranĝita en la Cirkulero 90-a mi ricevis du deklarojn. La unua estis subskribita de kolegoj Jung, Faulhaber kaj Cseh; al tiu deklaro aliĝis krome kolegoj Støp-Bowitz, Vilborg, kaj “plenkore” Butler. Mi opinias preferinda, pro la digno de nia Akademio, pro respekto al la pasintaj meritoj de ĝiaj aŭtoroj kaj pro deziro al la paco, ne reprodukti en oficiala dokumento nek respondi tian pecon. Mi tiom pli bedaŭras, ke la aŭtoroj komunikis ĝin al personoj eksteraj al la Akademio.

La dua deklaro, subskribita de kolegoj Vilborg, Støp-Bowitz kaj Setälä, estas de pli serioza tono. Ĝi prezentas kvin ĉefajn kritikojn: 1° “estas sub la digno de la Akademio transsalti la plej gravan fazon antaŭan al la decido: la esploradon”, farotan de la Sekcio pri Gramatiko; 2° la elpaŝo de la Estraro estas “influita de ekster-akademiaj organizaĵoj”; 3° la “Zamenhofs Esperanto estas difinita per la Fundamenta Gramatiko”; 4° “Zamenhof atribuis pli da graveco al la Gramatiko ol al la Ekzercaro”; 5° “kiel eblan bazon por interkonsento... ni pli frue proponis la regulon de de Beaufront”.

La respondoj al tiuj kritikoj estas tiel facilaj, ke apenaŭ plenvaloras ilin eldiri. 1° Kiam en Aprilo 1966 la Direktoro de la Gramatika Sekcio prezentis, post enketo daŭrinta jam de Februaro 1965, projekton de Rezolucio, tiuj samaj kolegoj principe rifuzis partopreni en la voĉdonado. Tio estis ja lerta manovro, por igi necesa la absolutan plimulton de ĉiuj membroj kaj malhelpi la akcepton de rezolucio, kiu ricevis 21 *jes* kontraŭ 2 *ne* kaj 1 *sindeteno*; sed tio malbone akordiĝas kun la nuna subita respekto por la laboroj de la Gramatika Sekcio.

Ĉu la klarigo ne estus, ke tiuj du kontraŭaj sintenoj devenas de unu sama taktiko de senfina prokrastado, kiun iniciatis jam en la Sofia kunveno de 1963 kol. Faulhaber, proponante lasi la aferon nedecidita... ĝis la venonta jarcento? 2° Vidu en la Statuto la artikolon 13-an, lastan alineon. 3° Tiu aserto estis jam forĵetita de la Akademio, vidu Cirkuleron 79-an. 4° Tiun argumenton ŝajne elpensis s-ro Kruit, kiu provis uzi ĝin por disvastigi la “malsanon tiom-kiom”. Dezirante ŝpari vian tempon, mi simple resendas la interesatojn al la respondo, kiun mi faris siatempe al tiu sinjoro (Vidu Aldonon A). 5° Pli konforme al la vero estus diri, ke niaj kolegoj proponis la du unuajn alineojn de tiu regulo, farante tiele neakcepteblan kaj arbitran distranĉon inter kvar tute egalaj kaj samtype presitaj paragrafoj. Se eventuale ili ŝanĝis tiun agmanieron kaj pretas nun akcepti tiun regulon en ĝia tuteco, ili bonvolu tion nur diri, kaj ni ĉiuj ĝoje tuj interbrakumos en reunuigita anaro!

* * * * *

Kaj nun, jen la rezultoj de la voĉdono:

Respondis **37** akademianoj; ne respondis **8** kolegoj: Bokarev, Collinson, Cseh, Hodakowski, Sevak, Söderberg, Solzbacher kaj Wong Kenn.

El tiuj **37** respondintoj:

- 26** opinias, ke nur la senco A de la kvar testofrazoj estas konforma al la lingvouzo de Zamenhof; ili estas kolegoj: Albault, Ariste, Atanasov, Auld, Bernard, Boulton, Conterno, Domingues, Downes, Gregor, Ĝuĝev, de Hoog, Kalocsay, Lapenna, Mijake, Nakamura, Neergaard, Pumpr, Rakuša, Régulo Pérez, Rossetti, Rotkvič, Sonnenfeld, Szilágyi, Tárkony kaj Waringhien.
- 1**, kol. Bugge-Paulsen, akceptas nur la sencon B ĉe la kvar frazoj.
- 2** voĉdonis mikse: kol. Haferkorn akceptas la sencon A de la unua kaj tria frazoj kaj la sencon B de la dua kaj kvara frazoj; kol. Lippmann opinias, ke la senco A estas akceptebla ĉe la kvar frazoj, sed ke ĉe la frazo dua la senco povas esti “*antaŭ* aŭ *je*, sed plej malfrue je la 9-a de Majo”, kaj “same kiel 2” ĉe la frazo kvara.

—2 voĉdonis sindetene: kol. Kawasaki, ĉar “en Esperanto vera pasivo ne ekzistas”, kaj kol. Rosbach, ĉar “la demandoj estas senkoncernaj al la problemo ata-ita” .

—fine 6 kolegoj – Butler, Faulhaber, Jung, Setälä, Støp-Bowitz, Vilborg – resendis sian voĉdonilon neplenigitan, deklarante, ke “la frazoj estas neklaraj aŭ konfuzaj” (Butler), ke “ilia senco povas varii laŭ la kunteksto” (Setälä), aŭ ke “la demandoj estas maladekvate formulitaj” (Støp-Bowitz) ktp. Ŝajnas, ke, blindigite de siaj aprioraj teorioj, al kiuj ili volas perforte adapti la faktojn, niaj kolegoj simple forgesis kaj la metitan demandon, t.e. kiu el la du sencoj estas konforma al la Zamenhofa uzado, kaj la oficialan interpretadon de la Fundamento voĉdonitan en Julio 1965. Male, modelon de scienca metodo montras la respondo de nia Akademia korespondanto Broise, kies voĉdono ne estis enkalkulita en la ĉi-supraj ciferoj, sed kiu meritas esti ĉi tie citita:

Frazo 1, senco A, pro la § 25, 25 de la Fundamenta Ekzercaro: “*Mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn*”;

Frazo 2, senco A, pro la § 25, 23: “*Mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ*”;

Frazo 3, senco A, pro la § 25, 21: “*Kiam via domo estis konstruata...*”;

Frazo 4, senco A, pro la § 12, 19: “*Vaŝington estis naskita la...*”.

Cetere, se kelkaj Akademianoj sentus sin ankoraŭ ne plene informitaj pri la afero, mi estas feliĉa povi nun enmanigi al ili, anekse al ĉi tiu Cirkulero, studmaterialon* tute objektivan kaj pli solidan ol iaj fantaziaj statistikoj kaj piramidaj ĵongloj: ĝin disponigis al mi s-ro W. Wingen, aŭtoro de tre konata kaj bonega lernolibro de Esperanto por la germanlingvanoj. Lin mi dankas pro lia afableco kaj gratulas pro la seriozeco de lia laboro.

IV. Sume: el 45 akademianoj, 37 opini-esprimoj kaj 31 voĉdonoj: ĉar tiu lasta cifero superas la du trionojn el 45, la necesa plimulto estas 16. Estas do decidite, per plimulto el 10 voĉoj, ke, laŭ la Fundamenta kaj Zamenhofa lingvouzo, ĉiu el la kvar testofrazoj havas nur unu senco, kaj tiu estas la senco A.

Mi kompreneble konigos al la konsultintaj Asocioj la pozitivan rezulton de la nuna voĉdono. Sed, ĉar ĝi prezentas ĝeneralan intereson por la esperantistaro, kaj liveras urĝe bezonatan rimedon ne nur efike rebati la atakojn de niaj konkurantoj-interlingvistoj, sed ankaŭ definitive forigi ĉian eblon de dusenceco en gravaj dokumentoj⁽¹⁾, la Estraro decidis dissendi al la pli gravaj Asocioj, kaj al la gazetaro oficialan komunikaĵon, kies tekston vi trovos ĉi-poste, kiel aldonon B.**

* *Temas pri kolekto de 102 frazoj, tiritaj el la unuaj tri volumoj de la “Fabeloj de Andersen”: Zamenhof tradukis ilin el la germana traduko, farita de H. Denhardt el la dana originalo. La germanaj kaj Zamenhofaj frazoj estas cititaj paralele: en ĉiu el ili Zamenhof uzis -ita, dum la atistoj tradukis per -ata. G.W.*

⁽¹⁾ Nia kolego Sonnenfeld ĵus komunikis al ni traŝan ekzemplon de tia danĝero:

“Por prilumi la gravecon de la afero, ni citas el “Heroldo de Esperanto”, n° 14 (1423) de la 16-11-66 la jenan noton:

Tradukdiferencoj en internaciaj traktatoj.

Ne malofte malfacilaĵojn en internacia vivo starigas la fakto, ke la tradukoj en traktato kun du aŭ pluraj egale aŭtentikaj tekstoj ne kongruas. Ekzemple en ĵusa plendo antaŭ la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj ekestis problemoj pri la kompreno de art. 5 de la Eŭropa Konvencio koncerne la liberecon kaj personan sekurecon de la individuo. Laŭ la angla teksto de la art. 5, akuzito havas rajton je proceso (“is entitled to trial”) en la daŭro de laŭrezona tempo, sed laŭ la franca teksto la akuzito havas rajton esti prijuĝita (“d’être jugé”) dum laŭrezona tempodaŭro. Alivorte laŭ la angla teksto sufiĉas, ke nur komenciĝis la proceso, sed laŭ la franca teksto estas necese, ke la koncerna tribunalo jam faris sian verdikton antaŭ la finiĝo de la menciita periodo. La diferenco inter la du tekstoj kaŭzis al la Eŭropa Komisiono problemojn de interpretado.

Se en esperanta traduko de la sama teksto oni uzus anstataŭ “prijuĝita” la formon “prijuĝata”, tiam evidente ankaŭ la Esperanta teksto estus ambigua (dubasenca).”

** *Vidu p. 63.*

11. CIRKULERO N° 91a - ALDONO A.

(Eltiraĵo el “Sennaciulo”, n-ro de Aŭgusto-Septembro 1955.)

Mia opinio pri la egalvaloreco de la Ekzercaro kaj de la Gramatiko rezultas simple el la Antaŭparolo al la Fundamento, kiu diras: “La sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1° La 16-regula gramatiko; 2° la “Universala Vortaro”; 3° la “Ekzercaro”. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj, li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ ĉi tiuj leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.” (p. VI); kaj plue: “Ĉio, kio troviĝas en ĉi tiu libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem.” (p. VII). Jen klara kaj nedisputebla aserto, kiu faras nenian distingon inter la “tri verkoj”, kaj kiu estis oficiale sankciita de la Unua Kongreso.

La “Lingvaj Respondoj”, male, kiel ajn altvaloraj ili estas, ne apartenas al la oficialaj dokumentoj, sed estas unu el tiuj verkoj, pri kiuj Zamenhof avertis nin, en tiu sama oficiala Antaŭparolo, ke “ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas, k.t.p. estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj... povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga” (p. VII).

Jen do, en la principo, du absolute diversaj dokumentoj: unuflanke la plena Fundamento, kiu estas la definitiva “leĝdonanto” de nia lingvo, aliflanke kolekto de aŭtoritataj, sed ja privataj konsiloj. Uzi tiun ĉi duan dokumenton por submini la unuan estas vere kurioza metodo kaj ne tre scienca.

*Sed, eĉ de la citita frazo de Zamenhof k-do Kruit faras ne ĝustan uzon. Se oni atentus efektive ĝian ĉirkaŭtekston, oni tuj rimarkas: 1° ke temas pri kritiko de unu verso el la “Preĝo sub la verda Standardo”, t.e. pri teksto antaŭa al la oficialigo de la Fundamento; 2° ke temas pri tute bagatela punkto, kiu tuŝas nek la morfologion, nek la sintakson de Esperanto. Jen la du konsideroj, kiuj klarigas la Respondon, kiu tekstas: “La esprimo “reunuiĝi l’homaron” estas efektive nebona, ĉar apostrofi la artikolon oni povas nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo. Sed la neobservado de tiu ĉi regulo, kiu estis donita ne en la gramatiko, sed nur en la “Ekzercaro”, estas ne eraro, sed nur peko kontraŭ boneco de la stilo.” Oni nun bone komprenas, ke la distingo farita ĉi-okaze inter la Gramatiko kaj la Ekzercaro havas ne ĝeneralan valoron, kiel volas kredigi al ni k-do Kruit, sed aplikon tute limigitan al la koncerna punkto. La samon certe Zamenhof ne estus dirinta pri reguloj, kiel ekz-e la akuzativo de direkto post prepozicio, pri la uzo de **da**, pri la gerundio, pri la nominativigo de la objekta predikativo, kiuj estas formulitaj nur en la “Ekzercaro” (§§ 28, 32, 22, 33, 35). Eĉ pri la gramatikaj aferoj oni devas havi iom da takto, kaj ne rigardi ĉiujn regulojn kaj reguletojn same gravaj.*

Sed eĉ pri tiel malgrava punkto, kiel tiu neregula apostrofado, la konkludo de Zamenhof estas tute alia, ol kredigus la fragmenta cito de k-do Kruit: ĉar la Respondo diras plue: “Sekve en prozo tiu ĉi regulo devas esti observata, sed en versoj, kie pro “licentia poetica” oni ofte permesas al si deflankiĝon de la ordinara stilo, la neobservado de la supre donita regulo (aŭ pli ĝuste konsilo) ne estas eraro.” Oni vidas, al kio reduktiĝas la duarangeco, kiun kelkaj atribuas al la reguloj de la Ekzercaro: temas simple pri okazo de “poezia licenco”! Mi tute ne kredas, ke Zamenhof estus montrinta la saman toleremon pri la uzado de tiom... kiom... ĉe la komparativo – kaj eĉ se mi eraras en mia supozo, ĉiel k-do Kruit ne verkadas verse, laŭ mia scio?

*“Per du linioj skribitaj de plej senkulpa homo oni povas pendumigi lin”,
diris iam kardinalo Richelieu; kaj tiu komprenis la aferojn.*

G. Waringhien.

**II. ENKETO kaj DECIDOJ
de la Akademio
pri la demando de
La Vortfarado en Esperanto**

La sekvanta Raporto estis, en sia primitiva formo, akceptita de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro kaj transdonita de ĝia Direktoro al la Prezidanto por submeto al voĉdonado de la Akademio; tio estis farita en la Cirkulero N° 78a de la 4a de Junio 1965. La rezultojn registris la Cirkulero N° 81a de la 21a de Januaro 1966:

El la 45 akademianoj respondis 33, t.e. pli ol la du trionoj; la necesa plimulto estis do 17. Voĉdonis

- jese 28** (Albault, Atanasov, Auld, Bernard, Butler, Collinson, Conterno, Domingues, Faulhaber, Gregor, Haferkorn, Hodakowski, de Hoog, Jung, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Neergaard, Obruĉev, Rakuša, Régulo Pérez, Rosbach, Rotkviĉ, Setälä, Szilágyi, Vilborg, Waringhien);
- nee 1** (Pragano);
- sindetene 4** (Bokarev, Kawasaki, Krestanov, Wong Kenn).

Krome ne respondis 12 (Baghy, Bugge-Paulsen, Cseh, Downes, Isbrucker, Lippmann, Ossaka, Pumpr, Sevak, Söderberg, Solzbacher, Støp-Bowitz).

El tiu voĉdonado la Prezidanto tiris jenajn konkludojn:

La teorio de vortfarado, prezentita en la “Konstatoj”, estas en sia principo kaj ĝeneralaj linioj aprobita de la granda plimulto el la akademianoj. Tamen pluraj lokoj en ĝi estas verŝajne plibonigeblaj, aliaj estas pli funde diskutindaj. Ni do invitas la kritikantojn kunlabori en la polurado de tiu teksto, sendante siajn kontraŭproponojn al la Direktoro, kiu faros pri ili komplementan raporton kun precizaj proponoj de plibonigoj... Ni volonte konsentas, ke la “Konstatoj” estas tro longa kaj kompleksa teksto, por esti oportune oficialigita kaj publikigita en la gazetaro. Tial, sekvante la saĝan sugeston de nia kolego Butler kaj en akordo kun la Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, ni proponas al vi rigardi la ĵus voĉdonitajn “Konstatojn” (post la eventuale enmetotaj plibonigoj kaj ĝustigoj) kiel la akceptitan bazon por formulado de koncizaj reguloj de vortfarado kaj ni petas de la Direktoro, ke li, post konsultado de sia Sekcio, proponu al la Akademio tekston de malmultaj simplaj reguloj, en kiujn kondensiĝu la materialo de la “Konstatoj”.

Sekve de tiuj konkludoj, la Direktoro redaktis tekston de “Rekomendoj”, kiujn aprobis la Sekcio kaj kiujn la Prezidanto prezentis al la voĉdonado de la Akademio per la Cirkulero N° 86a de la 16a de Marto 1967. La rezultojn registris la Cirkulero N° 88a de la 20a de Junio 1967 en la Aldono A. 2:

El la 39 tiamaj akademianoj respondis 27, t.e. pli ol la du trionoj: la necesa plimulto estis do 14. Voĉdonis

- jese 24** (Albault, Auld, Bernard, Bokarev, Butler, Collinson, Conterno, Domingues, Faulhaber, Gregor, Haferkorn, de Hoog, Kawasaki, Lapenna, Nakamura, Pumpr, Rakuša, Régulo Pérez, Rosbach, Rotkviĉ, Söderberg, Szilágyi, Vilborg, Waringhien);
- mikse 1** (Downes: ne por la § 6a, jes por la ceteraj);
- sindetene 2** (Jung, Wong Kenn).

Krome ne respondis 12 (Atanasov, Bugge-Paulsen, Cseh, Hodakowski, Kalocsay, Lippmann, Neergaard, Ossaka, Setälä, Sevak, Solzbacher, Støp-Bowitz).

La “Rekomendoj” estis do akceptitaj.

En tiu sama Cirkulero N° 88a, kiel Aldono C, la Direktoro de la Sekcio prezentis la modifojn, kiujn, post ricevo de la petitaj kritikoj kaj post konsulto de la sekcianoj, li redaktis kaj transdonis al la Prezidanto por submeto al la voĉdonado de la Akademio.

La rezultojn de tiu voĉdonado registris la Cirkulero N° 90a de la 1a de Oktobro 1967.

El la tiamaj 45 akademianoj respondis 36, t.e. pli ol la du trionoj: la necesa plimulto estis do 19. Voĉdonis:

jese 34 (Albault, Ariste, Atanasov, Auld, Bernard, Bugge-Paulsen, Butler, Conterno, Domingues, Downes, Faulhaber, Gregor, Ĝuĝev, Haferkorn, Hodakowski, de Hoog, Jung, Kalocsay, Kawasaki, Lapenna, Mijake, Nakamura, Pumpr, Rakuša, Régulo Pérez, Rosbach, Rotkvič, Setälä, Solzbacher, Støp-Bowitz, Szilágyi, Tárkony, Vilborg, Waringhien);

nee 1 (Rossetti);

sindetene 1 (Sonnenfeld).

Krome ne respondis 9 (Bokarev, Boulton, Collinson, Cseh, Lippmann, Neergaard, Sevak, Söderberg, Wong Kenn).

La proponitaj modifoj estis do akceptitaj de granda plimulto. Oni trovos ĉi-poste la definitivan tekston de la “Konstatoj de la Sekcio” (ĉapitro IIa) kaj de la “Oficialaj Rekomendoj de la Akademio” (ĉapitro IIIa).

LA VORTFARADO EN ESPERANTO

I. RAPORTO DE LA DIREKTORO (Sekcio de la Ĝenerala Vortaro)

Sinjoro Prezidanto !

Post la memorindaj laboroj de la fama logikisto COUTURAT, kiu volis trudi al Esperanto aprioran kaj do arbitran strukturon, sed kiu finfine sukcesis nur krei skismon en la internacilingva movado, nia lingvo havis la bonan ŝancon profiti la laborojn de aŭtenta sciencisto: René de SAUSSURE. Li ne kontentiĝis per la rimarko, ke la derivreguloj inventitaj de COUTURAT neniel konvenas al Esperanto kaj do ne povas utili kiel kriterio por ĝi, sed dum pluraj jaroj li studis la strukturon de la Zamenhofa lingvo kaj fine li povis starigi la bazajn regulojn, al kiuj *fakte kaj dekomence* obeas la vortfarado.

Liaj ĉefaj verkoj pri la temo estis:

1. *La logika bazo de la vortfarado en Esperanto* (“Sci.Rev.”, Aŭg. 10);
2. *La construction logique des mots en Espéranto* (du eld.: U.E.L., 1910, 84 p. – Kündig, 1910, 84 p. + 8 p.) Tiu verko ricevis la aprobon de ZAMENHOF (O.V., p. 455);
3. *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto – Raporto al la Akademio Esperantista, verkita de D-ro René de Saussure, Prezidanto de la Komisiono pri vortfarado* (Bern, 1915). Tiu broŝuro post enkonduko donis sur kvar paĝoj 16 regulojn (pli ĝuste: Difinoj: 1 – 6; Vortanalizo: 7 – 14; Vortsintezo: 15 – 16); la cetero estis dediĉita al detalaj klarigoj de diversaj vort-kunmetoj prenitaj el la kunteksto de ekzemplaj frazoj, eltiritaj ĉefe el la Fundamento kaj el la Fundamenta Krestomatio.

En ekzemplero de tiu tria broŝuro mi trovis rozan folieton “Al la membroj de la Lingva Komitato”, laŭ kiu mi eksciis, ke ZAMENHOF donis en letero sian personan opinion al la aŭtoro, “sed por ne influ la Akademianojn kaj L.K.-anojn, li deziras, ke oni ne konigu ĝin ĝis post la decido de la Akademio”. Pro la milito neniam estis decido; sed mi povis retrovi la leteron de ZAMENHOF en artikolo, kiun de SAUSSURE publikigis post la morto de la majstro (“Svisa Espero”, Jun. 17, p. 70-72; kun faksimilo de la aŭtenta letero), prave opiniante, ke certe la kreinto de la lingvo estas plej kompetenta juĝi, kiu el la diversaj teorioj tiam interbatalantaj estas la ĝusta. Efektive jen la (elfrancigita) komenco de tiu letero:

“Koncerne viajn “Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio”, mi povas diri al vi, ke en ĝi mi trovas nenion malaprobindan. Mi opinias, ke la Akademio povas doni sian aprobon al via broŝuro.”

La Akademio okupiĝis pri la problemoj kaj en 1913 akceptis la du unuajn “propoziciojn” de SAUSSURE (1910, 2., p. 73); nome: 1-e: ...“ke la vortformado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj reguloj de derivado”... – 2-e: ke oni observu “la du principojn de *neceso* kaj de *sufiĉo*”...

Precipe pro la milito, sed ankaŭ pro diversaj oponentoj (HÖVELER, PANEL,...) kaj la prudenta nerapidemo de la Akademio, kiu opiniis la teorion ne plene matura en sia formo, neniam estis traktitaj la 3 aliaj “propozicioj” de SAUSSURE (1910, 2.), nome kaj ĉefe: (3): logika ĝenerala

signifo de la finaĵoj kaj egaleco kun la sufiksoj: ul, aĵ, ec, ad; (4): klasigo de la radikoj laŭ la kvin klasoj: ul, aĵ, ec, ad, e.

Ankoraŭ malpli estis traktitaj la 16 “Fundamentaj reguloj de la Vortteorio” (1915), en kiuj de SAUSSURE iom pli ellaboris sian teorion kaj eĉ skizis la ĉefajn regulojn de la vortfarado.

Inter la du mondmilitoj oni disputis ĉefe pri la kerno de la teorio: ĉu estas konvene klasi la radikojn en tri grandaj kategorioj, aŭ ne? – Sed evidentas, ke tiu klasigo havas valoron, nur se ĝi ebligas klarigi la mekanismon de la vortfarado: vortklasigo kaj vortfarado formas unu nedisigeblan tuton kaj la ĝusteco de la premisoj (la vortkategorieco) estas plej bone demonstrita per la deduktitaj konsekvencoj: per la fakto, ke la tuta teorio kapablas maksimume pravigi la vortformojn, kiuj kreiĝis kaj estas uzataj de la komenco ĝis nun. Ja restas esceptaj kazoj, kiujn oni akceptu pro la tradicio; sed ili ne povas endanĝerigi la teorion.

Tre instrua pri la historio de la demando ĝis 1930 estas la broŝuro *Pri la vortfarado en Esperanto* de J. R. G. ISBRUCKER (“Of. Bult. Akademio”, 1959 – Represo el: “Esperantologio”, II. 12-36, 1959).

Estis la merito de nia eminenta Kolego KALOCSAY plene ellabori tiun teorion (en: *Lingvo, Stilo, Formo*. Literatura Mondo, 1931. 143 p.; kaj poste en: *Plena Gramatiko* kunlabore kun G. WARINGHIEN). SAUSSURE serĉadis la ĝustan vojon kaj devis argumenti unue kontraŭ COUTURAT kaj pli poste kontraŭ la internaj oponentoj al lia teorio. KALOCSAY feliĉe povis flanke lasi tiajn zorgojn, kaj prosperis al li elĉizi novan formon de la sama teorio, klaran kaj spirito-kontentigan, senbalastigitan je ĉiuj flankaj konsideroj. Liaj distingo de la rekta kaj de la inversa vortefikoj estas, interalie, notindaj.

Nun, ni estas en tia stato, ke ni posedas elproviditan teorion, kiu fidele klarigas, kiel estas formitaj – kaj plu ĉiutage formataj – la vortoj uzataj de Zamenhof kaj de la bonaj aŭtoroj. Plie ĉiuj nunaj uzantoj de la lingvo, se nur ili korekte lernis ĝin, skribe aŭ parole formas la vortojn laŭ la principoj de tiu teorio, eĉ se ili ne studis aparte tiujn ĉi. Kaj tie ĉi oni ne povus tro emfazi, ke ne temas, kiel ĉe COUTURAT, pri reguloj arbitre elpensitaj, laŭ iuj “logikaj” modliloj, sed tute male, ke temas pri *konstatoj*, pri reguloj *science ekstraktitaj el la lingvo mem, kia oni ĝin uzas skribe kaj parole*.

Ni opinias, ke post la dua mondmilito eĉ ne unu sola voĉo leviĝis kontraŭ tiun teorion en ties tuto. Sed ja leviĝis aliaj voĉoj, ke la Akademio devus finfine ĝin aprobi! Aliparte, kelkaj aŭtoroj ja diskutis iujn detalpunktojn, sed konforme al la ĝeneralaj linioj de la teorio ⁽¹⁾ Verŝajne ankoraŭ eblos fajli detaletojn, fiksi la karakteron de kelkaj radikoj (iam STOJAN asertis: ducento) ktp... Sed ĉefa punkto estas jena: la probablecon, ke oni starigos novan teorion, ni povas konsideri nula, ĉar necesus, ke la nova kapablu klarigi almenaŭ tiel multe kaj tiel funde kaj esence kiel la ĝisnuna: ĝi povus esti nura parafrazo.

(¹) Ni citu i.a.:

D. B. GREGOR. Kion la U.V. vere instruas pri la gramatika karaktero de la E-aj radikoj? (en “*La fontoj de E-o, kaj du notoj pri la U.V.*” – Depresaĵo el Sci. Rev., 9, p. 92/115, 24 p.)

H. A. de HOOG. La senpera verbigo de adjektivoj. K.U.N.E., Den Haag (1956?) 32 p.

E. WŪSTER. La oficiala radikaro kun enkonduko kaj notoj. E-o Verlag Ellersiek und Borel. Berlin, Dresden, 1923. XVI + 70 p.

Tial ni konvinkiĝis, ke estas tempo por la Akademio aprobi tiun teorion, kaj en la nomo de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro mi petas vin, kara Prezidanto, submeti al la voĉdonado de niaj Kolegoj jenan tekston de *Konstatoj de la Sekcio*, kiu poste estus publikigebla; ĝi resumas en harmonian tuton de 17 paragrafoj la ĉefajn liniojn de nia vortfarado: ekde la vortkategorieco ĝis la principo de neceso kaj sufiĉo. – Komence de la jaro mi verkis unuan tekston por tiuj Konstatoj kaj nia Kolego K. KALOCSAY bonvolis honori nin per sia kunlaboro, plene reverkante tiun unuan tekston; ŝajnas al mi, ke nun ni apenaŭ povus ricevi pli kompetentan kaj pli eminentan prezenton de tiu teorio: tiun lastan tekston bonvole legu ĉi-poste.

Kun altestimaj salutoj,

D-ro A. ALBAULT,

Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

II. KONSTATOJ DE LA SEKCIO

I. NI KONSTATAS, ke en la kvinlingva Universala Vortaro de la “Fundamento de Esperanto” la Esperantaj vortoj estas prezentitaj sen finaĵo kiel nudaj radikoj kaj estas tradukitaj en la naciajn lingvojn parte per substantivo, parte per adjektivo, parte per infinitivo de verbo. Laŭ tio do oni povas distingi tri grandajn kategoriojn de radikoj: substantive tradukitajn, adjektive tradukitajn kaj infinitive (verbe) tradukitajn. Ĉar laŭ la sama Vortaro la substantivecon markas la finaĵo **-o**, la adjektivecon la finaĵo **-a** kaj la verbo-reprezantan infinitivon la finaĵo **-i**, tiujn tri kategoriojn oni povas nomi O-radikoj, A-radikoj kaj I-radikoj kaj signi per O-, A- kaj I-.

RIM. Krome ekzistas ankaŭ adverbe tradukitaj radikoj (E-radikoj) kaj aliaj elementoj, kiuj ne estas finaĵbezonaĵoj (numeraloj, pronomoj, tabelvortoj, primitivaj adverboj, prepozicioj, konjunkcioj, partikuloj, interjekcioj). Ĉiuj ĉi tamen aŭ ne havas signifon en la vortfarado, aŭ estas klaseblaj en iun el la tri grandaj kategorioj, aŭ postulas specialan konsideron.

II. NI KONSTATAS, ke laŭ la Fundamenta Gramatiko la finaĵoj “estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj” (R. 11). Tio tamen ne signifas, ke ili estas uzataj kiel memstaraj vortoj, ĉar tiaj provoj sporadaj (ekz-e “la mastro as fore” aŭ “l’ o necesa” aŭ “a birdo”) ĝis nun ne estis imitataj; tio signifas nur, ke ili povas funkcii kiel substantiviga, adjektiviga aŭ verbiga elementoj (sufiksoj). Efektive, el la tri kategorioj de radikoj (O-, A-, I-) kaj el la tri finaĵoj (-o, -a, -i) oni povas fari naŭ kombinaĵojn: O + o, O + a, O + i; A + a, A + o, A + i; I + i, I + o, I + a). Ekzemple *oleo, olea, olei; avida, avido, avidi; skribi, skribo, skriba*.

III. NI KONSTATAS, ke en la “Fundamento de Esperanto” ne troviĝas regulo, kiu malpermesus, ke iun ajn finaĵon oni uzu kun iu ajn radikoj; la sola kondiĉo de la uzebleco estas, ke la formita vorto havu ian sencon.

IV. NI KONSTATAS, ke, kiam la kategorio de la radikoj estas identa kun la karaktero de la finaĵo (O + o, A + a, I + i), la finaĵoj havas ja gramatikan signifon, ĉar ili signas la singularon kaj la nominativan kazon, aŭ la infinitivon, sed ili ne havas vortfaradon, ĉar la vortoj formitaj per ili havas la saman tradukon, kiel la nuda radikoj en la Universala Vortaro. Oni povas do diri, ke la finaĵoj tiaokaze estas pleonasmaj el la vidpunkto de la vortfarado. Tiu pleonasmeco signifas, ke ne nur la finaĵoj markas la signifo-kategorion substantivan, adjektivan aŭ verban, sed ke ankaŭ la substantiva, adjektiva aŭ verba traduko de la radikoj en la Universala Vortaro markas ties signifo-kategorion substantivan, adjektivan aŭ verban. La O-radikojn oni do povas nomi substantivaj, la A-radikojn adjektivaj, la I-radikojn verbaj.

V. NI KONSTATAS,

A) ke la substantive tradukitaj radikoj (= O-radikoj, substantivaj radikoj) havas tre diversajn sencojn: ili signifas ekz-e individuojn (*persono, infano, viro*), profesiulojn (*tajloro, profesoro, barbiro*), familianojn (*filo, edzo, onklo*), bestojn (*leono, kankro, vermo*), plantojn (*kverko, lilio, fungo*), lokojn (*hejmo, urbo, lando*), instrumentojn (*violono, martelo, broso*), materialojn (*oro, metalo, ŝtono*), sciencojn (*fiziko, matematiko, logiko*), nociojn (*ideo, eklezio, poezio*), ktp. ktp., sed ili havas la komunan karakterizaĵon, ke

1. kun la o-finaĵo ili havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;

2. kun la a-finaĵo ili povas havi tri signifojn: a) identa al la radikoj (*reĝa persono*); b) karakterizata de la kvalito de la radikoj (*reĝa sinteno*); c) rilata aŭ apartena al la radikoj (*reĝa palaco*). Alivorte: O + a povas esti: a) O-identaj, b) O-kvalitaj, c) O-rilataj aŭ O-apartenaj;

3. kun la i-finaĵo ili havas la sencon: agi aŭ stati kiel la radiko (*tajlori, gastu*), aŭ agi per la radiko (*marteli*), aŭ agi karakterizate de la radiko (*ondi, nesti*). Alivorte: O + i = manifestiĝi (agi aŭ stati) O + e.

B) ke la adjektive tradukitaj radikoj (= A-radikoj, adjektivaj radikoj)

1. kun la pleonasma a-finaĵo havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;
2. kun la o-finaĵo ili signas la nomon de la kvalito donita en la Universala Vortaro (*la bono, la belo*) aŭ la konkretan manifestiĝon de la respektiva kvalito (*la forto, la varmo*);
3. kun la i-finaĵo ili signifas: manifestiĝi (stati aŭ efiki) karakterizate de la radiko (*rapidi, verdi, sani*).

C) ke la infinitive tradukitaj radikoj (= I-radikoj, verbaj radikoj)

1. kun la i-finaĵo havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;
2. kun la o-finaĵo ili signas la nomon de la ago donita en la Universala Vortaro, ago konsiderata kiel fakto kaj kune kun sia konkreta manifestiĝo aŭ rezulto (*promeno, flego, parolo; altaj konstruoj, sigelita skribo, rompita baro*);
3. la a-finaĵo laŭsence gluiĝas ne senpere al la verba radiko, sed al ties substantivigita formo, do I+a = I+o+a. La senco de la a-finaĵa verbradiko, tiel same kiel ĉe la a-finaĵaj substantivradikoj, povas esti: a) identa kun la ago (*ama sento, detrua ago*); b) havanta la agon kiel kvaliton (*ama koro, detrua vento*); c) rilata aŭ apartena al la ago (*ama letero, detrua intenco*). Alivorte: I + a povas esti: a) I + o-identaj, b) I + o-kvalitaj, c) I + o-rilataj aŭ I + o-apartenaj.

VI. NI KONSTATAS, ke pri la granda plimulto de la radikoj estas per si mem evidente, al kiu kategorio ili apartenas. Tiu kategorio, cetere, estas aludita en la Universala Vortaro (uv), Oficialaj Aldonoj (oa) kaj en la bonaj vortaroj.

Tamen ni konstatas, ke tiuj verkoj principe ne estis verkitaj kun la intenco montri la signifikategoriojn, kaj tial en pluraj okazoj oni devas esplori la Zamenhofan lingvuzon kaj la lingvuzon de bonaj aŭtoroj por konstati la kategoriecon, ĉar okazis, ke elementoj transiris el unu kategorio en alian.

Ekz-e: *flori* (uv), *floro* (uv) estas O-kategoria, ĉar *flori* = manifestiĝi flore (t.e. produkti florojn).

firma (uv) (= solida) kaj *firmo* (uv) (= komerca societo) efektive estas du radikoj homonimaj: *firma* estas A-kategoria, *firmo* estas O-kategoria.

piki (uv) (*per pinto*) estas I-kategoria, sed *piko* (uv) (ludkarta figuro) estas O-kategoria.

planti (uv), (plantisto, plantado, ...) origine estis I-kategoria; *planto* en la fruaj tempoj simple ne estis uzata. Ĝia ekuzo kun la signifo de kreskaĵo transportis la radikon al la O-kategorio; la ceteraj kunmetaĵoj ne modifiĝis.

VII. NI KONSTATAS, ke la elementojn, krom la radikoj, ĉu pro ilia reala signifikategorio (afiksoidoj), ĉu pro la funkcioj, kiujn ili ekhavas en efektivaj kunmetaĵoj, oni povas praktike klasi jene:

En la O-kategorio: la finaĵon *-o*, sufiksoidojn: *ad, aj, ec, ul; an, ar, ej, er, estr, id, il, in, ing, ism, ist, uj; obl, on, op*;

En la A-kategorio: la finaĵon *-a* kaj la parencon *-e* (kiu estas propre adjektivo kun alia gramatika rolo), la adverbe tradukitajn radikojn aŭ E-radikojn (el la sama kaŭzo), la prefiksoidojn: *dis, ek, for, mis, re*; la sufiksoidojn: *abl, em, end, ind*; la primitivajn (nesimetriajn kaj aŭ-finaĵajn) adverbojn; la prepoziciojn, la interjekcion *fi*;

En la I-kategorio: la finaĵon *-i* (kaj la parencajn *-as, -is, -os, -us, -u*); la afiksoidojn: *ig, iĝ*; la prepozicion *per*; la interjekcion *ve*.

Eksterkategorie staras:

1. ĉiuj elementoj, kiuj ĝenerale ne formas kunmetaĵojn: la artikolo *la*, la partikulo *ĉi*, interjekcioj, konjunkcioj;

2. la elementoj obeantaj specialajn regulojn:

a) la numeraloj estas du-kategoriaj: jen O-kategoriaj; *du plus du estas kvar*, jen A-kategoriaj: *du birdoj*. La a-finaĵo ĉe ili servas formi vicmontran numeralon kaj tial ĝi konserviĝas ĉe ties pluformado (*unuaco*); la substantivan karakteron oni povas plifortigi per la o-finaĵo (*unuco, cento*); tamen ĉe la a-finaĵa pluformado tiu o-finaĵo ne konserviĝas, sed estas anstataŭata de la sufikso *-op-* (*unuopa, centopa*);

b) ĉe la participoj la o-finaĵo neniam formas la nomon de abstrakta koncepto aŭ kvalito, sed la nomon de estulo aŭ de aĵo, kiu faras – respektive suferas – la agon difinitan de la radiko: ĝenerale temas pri persono (*amanto, konato*). Ĉi tie do la a-finaĵa kaj la o-finaĵa formoj estas sendependaj unu de la alia.

c) la pronomoj personaj estas kvazaŭ apartaj substantivoj, en kiuj la o-finaĵo ne estas esprimita: *mi(o), mi(o)n, mi-a*.

d) la du kares-sufiksoj (*ĉj, nj*) apenaŭ estas uzataj memstare; se tamen jes, ili havas substantivan karakteron (mia njo, njo-knabo).

e) la elemento *um* estas plurkarakterata: jen substantiva (*buŝumo*), jen adjektiva (*proksimuma*), jen verba (*krucumi*).

VIII. NI KONSTATIS,

1. ke post adjektivaj radikoj la o-finaĵo signas la nomon de la kvalito esprimata de la radiko aŭ ties konkretan manifestiĝon. Tiu konkreta manifestiĝo povas esti konkretaĵo (*malfaciloj, malagrabloj*), kvalito de iu aŭ de io (*belo de virino, malfacilo de tasko*), aŭ eĉ individuo (*mia kara, mia belo* ²). Tiun komunan aŭ *resuman formon*, tamen, oni uzas nur escepte, precipe en la poezio. Ordinare oni distingas la diversajn specojn de manifestiĝoj per la t.n. kategorio-sufiksoj (*aĵo, eco, ulo*). La simpla o-finaĵa formo signifas la respektivan kvaliton kutime nur kiel abstraktan nocion (*la belo, la bono*) aŭ fizikan nocion (*la varmo, la forto*). La konkretan manifestiĝon indikas *-aĵo* (*malfacilaĵoj, malagrablaĵoj, belajoj, bonaĵoj*), la kvaliton de iu aŭ de io indikas *-eco* (*ies beleco, boneco, forteco; malfacileco de tasko*). La individuan manifestiĝon signas *-ulo* (*belulo, bonulo, fortulo*).

2. ke post verbaj radikoj la o-finaĵo signas la nomon de la respektiva ago konsiderata kiel fakto kaj kune kun sia konkreta manifestiĝo aŭ rezulto (*konstruo, skribo, danco, kanto; altaj konstruoj, sigelita skribo, folkloro danco, populara kanto*). Sed se oni konsideras la agon en ties fariĝo, la agon evoluantan en sia daŭro, oni uzas kunmetaĵon per *-ado* (*konstruado, skribado, dancado, kantado*); aliflanke, se oni volas konsideri la konkretan manifestiĝon aŭ la rezulton sed ne plu la agon mem, oni uzas kunmetaĵon per *aĵo* (*konstruaĵo, skribaĵo*).

IX. NI KONSTATIS, ke el la substantivradikaj substantivoj (O + o), oni povas finaĵe formi kvalit-sencan adjektivon (O + a); ekz-e: *homa sento, edza vivo, hejma atmosfero*. Por signi la nomon de tiuj kvalitoj, oni devus kroĉi al la a-finaĵo la o-finaĵon: *homao, *edzao, *hejmao. Anstataŭ tio oni uzas la kategorio-sufikson *-eco*: *homeco, edzeco, hejmeco*. Laŭ ĉi tio do: eco = aO-o.

Ni konstatis ankaŭ, ke el ne-verbradikaj substantivoj (O + o, A + o) oni povas formi finaĵe verbojn (*agenti, genui, verdi, rapidi, utili*). Por esprimi la nomon de ĉi tiuj agoj, oni devus kroĉi la

o-finaĵon al la i-finaĵo (*agentio, *genuio, *verdio, *rapidio, *utilio). Anstataŭ tio oni uzas la kategorio-sufikson *-ado*: *agentado, verdado, genuado, utilado, rapidado*. Laŭ ĉi tio do: *ado* = iO-o.

X. RILATE al la vortkunmeto, la Fundamenta Gramatiko diras: “Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino)” (R. 11). Ni konstatas, ke tiu ĉi regulo koncernas ankaŭ la t.n. sufiksojn, escepte de *eta, ega* kaj *aĉa*, kiuj, kvankam starantaj en la fino de la kunmeto, ne estas “ĉefaj vortoj”, sed sole modifas (grandigas, malgrandigas, aĉigas) la sencon de la antaŭa radiko. Oni povas ilin nomi veraj sufiksoj, aŭ deriviloj, aŭ modifiloj.

Krom en la vortoj kun ĉi tiuj modifiloj, ne validas la Fundamenta regulo de la vortkunmeto en la t.n. vortapudmetoj, en kiuj du vortoj de sama signifo-kategorio estas simple apudmetitaj, ne estante suborditaj unu al la alia; ordinare ambaŭ vortoj konservas sian finaĵon kaj ili estas ligitaj per streketo. Tiaj povas esti du substantivoj: *majstro-oratoro, soldato-kamarado, membro-abonanto*; du, eĉ tri adjektivoj: *surda-muta, ruĝa-blanka-blua standardo*; du adverboj: *vole-nevole, trafe-maltrafe, pli-malpli, iele-tiele*. Tia apudmeto estas signifa precipe per tio, ke tiel ligiĝas la kategorio-sufiksoj (Vd. §VIII: *-aĵo, -eco, -ulo*), kaj plie: *vir-, ĉef-* kaj *-ino*.

En la ceteraj kunmetoj, la ĉefa vorto, kiu staras en la fino, subordigas al si la elementon starantan antaŭ ĝi. La ĉefan vorton oni povas nomi ĉefelemento kaj la vorton starantan antaŭe flankelemento. Ekzemple, en la vortkunmeto *vaporŝipo* la ĉefelemento estas *ŝipo* kaj la flankelemento estas *vapor(o)*.

Ni konstatas, ke la ĉefelemento vortigas la antaŭan elementon (la flankelementon), laŭ jenaj reguloj de la “rekta vortefiko”.

A) Substantiva ĉefelemento (t.e. ia-ajn-kategoria o-finaĵa radiko staranta en la fino) substantivigas la ia-ajn-kategorian flankelementon, t.e. kroĉas al ĝi manifeste aŭ latente la o-finaĵon. La rilato inter la du elementoj estas esprimebla per la prepozicio *de*, kiu estas anstataŭigebla ankaŭ per alia, pli preciza prepozicio. Ekz-e: **homkoro** = *homo-koro* = *koro de homo*; **varmenergio** = *varmo-energio* = *energio de varmo*; **skribmaŝino** = *skribo-maŝino* = *maŝino por skribo*; **kuraĝprovo** = *kuraĝo-provo* = *provo de aŭ pri kuraĝo*; **libertempo** = *libero-tempo* = *tempo de libero*.

B) Adjektiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon, t.e. kroĉas al ĝi manifeste aŭ latente la o-finaĵon. La interelementa rilato estas esprimebla per la prepozicio *je*, kiu estas anstataŭigebla ankaŭ per alia, pli preciza prepozicio. Ekz-e: **herbriĉa** = *herbo-riĉa* = *riĉa je herbo*; **varmplena** = *varmo-plena* = *plena de varmo*; **servpreta** = *servo-preta* = *preta por servo*; **florsimila** = *floro-simila* = *simila al floro*; **komunutila** = *komuno-utila* = *utila al komuno*.

C) Verba ĉefelemento povas efiki al sia flankelemento trimaniere:

1. substantivige; la interelementan rilaton esprimas la prepozicio *per*. Ekz-e.: **martelbati** = *martelo-bati* = *bati per martelo*; **paŝmurdi** = *paŝo-murdi* = *murdi per paŝo*;

2. adjektivige, farante ĝin, laŭ la formo, sia predikata adjektivo, laŭ la senco, rezulta adjekto: **ruĝpentri** = *pentri ruĝa*; **purlavi** = *lavi pura*; **sanigi** = *igi sana*;

3. adverbige, farante ĝin manier-adjekto; tiu ĉi efiko, tamen, estas escepta ĉe adjektivradika flankelemento (ekz-e: **bonfarti**) kaj validiĝas precipe, kiam la flankelemento estas verba prefikso (**disstarti, ekiri, foresti, misuzi, revidi**) aŭ prefikse uzata prepozicio (**ĉirkaŭrigardi, ĝisatendi, interŝanĝi, kontraŭkuri, trakuri**).

Tiuj reguloj **A, B, C** estas la bazaj reguloj de la vortkunmeto en Esperanto.

RESUME: la interelementa rilato inter la elementoj de kunmetita vorto ĝenerale estas tia, ke la flankelemento rilatas al la ĉefelemento kiel substantivo antaŭata de prepozicio: **varmenergio** = *energio de varmo*, **servpreta** = *preta je servo*, **paŝmurdi** = *murdi per paŝo*. Krome, la flankelemento de verba ĉefelemento povas esti predikata adjektivo kun senco de rezultadjekto: **purigi** = *igi pura*, kaj ankaŭ manier-adjekto adverba, sed prefere nur, se la flankelemento estas adverba aŭ prepozicia prefikso: **revidi, ĉirkaŭflugi**.

Ĝenerale nekorektaj estas tiuj kunmetoj, en kiuj la flankelemento estas adjektiva epiteto de la ĉefelemento (*dikonklo, belbirdo, bonprofesoro, diligentstudento*, ks.). Evitindaj estas ankaŭ tiuj kunmetoj, en kiuj la adjektivradika flankelemento rilatas al la verba ĉefelemento kiel adverba manier-adjekto (*bonlerni, beldanci, precizkalkuli*, ks.)

Kelkaj uzataj tiaj kunmetoj, nerespondaj al la bazaj reguloj, estas esceptoj kaj ne pravigas aliajn similajn kunmetojn; ekz-e: *dikfingro* ne pravigas la vortojn *dikonklo* aŭ *dikporko*; nek *junedzino* pravigas la vortojn: *junamiko* aŭ *junfraŭlino*.

Aliajn ŝajnajn esceptojn klarigas la pluformado de la regulaj kunmetoj (Vd. § XI), la vortliga funkcio de la finaĵoj (Vd. § XII, XIII) kaj la inversa vortefiko (Vd. § XIV, XV).

XI. NI KONSTATAS, ke la vortkunmetoj faritaj laŭ la bazaj reguloj estas pluformeblaj per finaĵoj; tiam la finaĵo sendependiĝas de la ĉefelemento kaj rilatas al la tuta kunmeto. Ekz-e: *urbodoma* = *urbo-domo-a*; *domkonstrua* = *domo-konstruo-a*; *leterskribi* = *letero-skribo-i* = *i per leterskribo*. Tiaj pluformitaj vortoj ne estas analizeblaj laŭ la bazaj reguloj (*domo je urbo*, aŭ *skribi per letero, skribi letere, skribi letera*), ĉar tiamaniere ili ne havas sencon. Oni devas serĉi ilian bazan formon: *urbodomo, domkonstruo*, kaj al tiu rilatigi la memstaran finaĵon.

XII. NI KONSTATIS en la § IX., ke ĝenerale oni ne povas fari vortkunmeton el substantivo kaj el ties adjektiva epiteto. Tamen memstara a-finaĵo povas efiki per interkroĉado de tiaj du elementoj, farante el ili unu adjektivan vortkunmeton: *facilanima* = (*facila animo*)-a, *bluokula* = (*blua okulo*)-a, *nigrahara* = (*nigra haro*)-a, *larĝaŝultra* = (*larĝa ŝultro*)-a, *samidea* = (*sama ideo*)-a. Kompreneble, ankaŭ ĉi tiuj vortkunmetoj ne estas analizeblaj laŭ la bazaj vortkunmetaj reguloj; krom ĉi tio ilin rekonigas, ke kun la o-finaĵo ili donas kontraŭregulan adjektivo-substantivan kunmeton (*facilanimio, bluokulo, nigraharo* ktp).

En ĉi tiuj kunmetoj, el la strukturo de la vortoj sekvas, ke la finaĵo de la adjektiva elemento devas esti -a kaj neniel -e: do *nigranaza, larĝaŝultra*, ĉar ne temas pri la adverba epiteto de adjektivo (*naza, ŝultra*) sed pri adjektiva epiteto de substantivo (*nazo, ŝultro*).

Kiel la memstara finaĵo, tiel same ankaŭ sufiks(oid)oj povas efiki per interkroĉado de la substantivo kun ties adjektiva epiteto: *facilanimeco* = (*facila animo*)-eco, *bluokuleco* = (*blua okulo*)-eco, *nigraharulo* = (*nigra haro*)-ulo; *larĝaŝultrulo* = (*larĝa ŝultro*)-ulo, *samideano* = (*sama ideo*)-ano.

XIII. NI KONSTATAS, ke la memstara finaĵo povas efiki per interkroĉado ankaŭ de substantivo kun prepozicio: *ĉirkaŭurba* = (*ĉirkaŭ urbo*)-a, *eksterlanda* = (*ekster lando*)-a, *transmara* = (*trans maro*)-a, *senkora* = (*sen koro*)-a.

Kiel la memstara finaĵo, tiel same ankaŭ sufiks(oid)oj povas efiki per interkroĉado de la substantivo kun ties prepozicio: *eksterlandano* = (*ekster lando*)-ano, *senkorulo* = (*sen koro*)-ulo.

En la kazoj sub § XI., XII. kaj XIII. la vortkunmetoj estas trielementaj: ili konsistas el ĉefelemento, kiu estas finaĵo aŭ sufiks(oid)o kaj el duobla flankelemento, el kiuj la dekstra estas substantiva kaj la maldekstra estas adjektivo aŭ prepozicio.

Ni konstatas, ke ĉe duobla flankelemento ties du elementoj povas interrilati laŭ la vortkunmetaj reguloj: *urbodoma* = (*domo de urbo*)-a, *domkonstrua* = (*konstruo de domo*)-a, kaj ankaŭ laŭ la sintaksaj reguloj, do adjektiva epiteto aŭ prepozicio kun substantivo: *nigrahara* = (*nigra haro*)-a, *senkora* = (*sen koro*)-a.

XIV. NI KONSTATAS, ke ĉe duobla flankelemento ne nur la dekstra elemento povas difini la vortkarakteron de la maldekstra elemento (ekz-e: *skribmaŝina* = *skribo-maŝino-a*), sed ankaŭ la maldekstra elemento povas efiki al la dekstra, difinante ties vortkarakteron. Adjektiva aŭ prepozicia maldekstra elemento efikas substantivige: *grandkuraĝa* = (*granda kuraĝo*)-a = *karakterizita de granda kuraĝo*; *palblua* = (*pala bluo*)-a; *helverda* = (*hela verdo*)-a; *senforta* = (*sen forto*)-a; *senutila* = (*sen utilo*)-a; *senpova* = (*sen povo*)-a; *senduba* = (*sen dubo*)-a. Verba prefikso kiel

maldekstra elemento efikas verbige: *reformo* = *re-formi-o*; *ekmartelo* = *ek-marteli-o*. Tio estas la “inversa vortefiko”.

XV. NI KONSTATAS, ke per la inversa vortefiko povas estiĝi plurala aŭ substantiva senco de elemento, kaj per tio la finaĵo povas roli kiel memstara. Ekz-e, en *triangulo* “tri” sence pluraligas la elementon “angulo” kaj memstarigas la o-finaĵon laŭ la strukturo: (*tri anguloj*)-o = *triangulaĵo*. Tiel same: *senforto* = (*sen forto*)-o = *senforteco*; *senpovo* = (*sen povo*)-o = *senpoveco*. Tiujn formojn oni nomas “streĉitaj formoj”.

XVI. NI KONSTATAS, ke ekzistas vortkunmetoj ankaŭ kun triobla flankelemento, kiu povas esti:

1. prepozicio + substantivo interkroĉitaj per la a-finaĵo: *enlitiĝi* = *enlita-iĝi* = (*en lito*)-a-iĝi; *altablĝi* = *altabla-iĝi* = (*al tablo*)-a-iĝi; *elseliĝi* = *elsela-iĝi* = (*el selo*)-a-iĝi. En tiuj kunmetoj anstataŭ la prepozicioj *ĉe* aŭ *apud* oni uzas *al* kaj anstataŭ *ekster* oni uzas *el*.

2. du substantivoj interkroĉitaj per prepozicio: *vizaĝaltere* = (*vizaĝo al tero*)-e, *vidalvide* = (*vido al vido*)-e; *korpsurkorpa* = (*korpo sur korpo*)-a.

XVII. NI KONSTATAS, ke la vortfarado obeas al jenaj reguloj de neceso kaj sufiĉo:

En la konstruon de la vorto oni devas enkonduki ĉiujn elementojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas, por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan.

La faktoroj, kiujn oni konsideras ĉe la neceso kaj sufiĉo, povas kuŝi ankaŭ ekster la vorto, en la kunteksto. Helpe de ĝi oni povas uzi t.n. resumajn formojn anstataŭ la ekzaktaj.

III. REKOMENDOJ DE LA AKADEMIO

**La Akademio de Esperanto,
aprobe konsiderinte la “Konstatojn
de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro”,
rekomendas, ke
oni atentu jenajn principojn de vortfarado,
kiuj rezultas el la analizo de la
konstanta uzado de la lingvo.**

§ 1.– La tri ĉefaj finaĵoj **-o**, **-a**, **-i**, kune kun siaj signifoj, difinas tri ĉefajn signifokategoriojn, al kiuj apartenas almenaŭ ĉiu negramatika radiko; nome, la substantivan signifokategorion (ekz-e: *arb-o*, *hom-o*, *ide-o*), la adjektivan signifokategorion (ekz-e: *grand-a*, *bel-a*, *laŭt-a*), kaj la verban signifokategorion (ekz-e: *kur-i*, *sid-i*, *pens-i*).

§ 2.– La finaĵoj havas duoblan funkcion, gramatikan kaj vortfaran. Rilate la vortfaradon, oni devas distingi du okazojn: en la unua, la finaĵo troviĝas post unu radiko de la sama kategorio kaj sekve aldonas nenian signifon en la vorto (ekz-e: *patro*, *egala*, *ami*); en la dua okazo, la finaĵo troviĝas post unu radiko de alia kategorio kaj tiam ĝi aldonas al tiu radiko sian signifon (ekz-e: *patra*, *egali*, *amo*).

Tiu signifo ĉe la tri ĉefaj finaĵoj povas esti resumita jene:

- o: tio, kio estas.**
- a: kiu havas la econ de.**
- i: manifestiĝi per.**

§ 3.– Pli precize,

1) kun radiko de adjektiva kategorio la finaĵo **-o** havas la signifon de kvalito kaj konkreta manifestiĝo de tiu kvalito; ekz-e: *la belo*, *la ruĝo*, *la eblo*. Kontraste, **aĵ** montras la nuran konkretan manifestiĝon, dum **ec** montras nur la kvaliton; ekz-e: *belajaĵo*, *beleco*.

2) kun radiko de verba kategorio la finaĵo **-o** havas la signifon de ago kaj konkreta manifestiĝo aŭ rezulto de tiu ago; ekz-e: *la kuro*, *la danco*, *la konstruo*. Kontraste, **aĵ** montras ion konkretan estigitan de la ago, dum **ad** havas la signifon de ago konsiderata en sia daŭro; ekz-e: *la dancado*, *la konstruado*, *la konstruaĵo*.

§ 4.– En unu aparta speco de kunmetaĵoj la lasta vorto estas la ĉefa kaj ĝia radiko difinas la signifokategorion de la tuto; ekz-e: *tritikkampo* estas kampo; *vaporŝip-* (en: vaporŝipo, vaporŝipa, vaporŝipe,...) estas substantiv-kategorio, same kiel *ŝipo*; *varmruĝa* estas ruĝa; *martelbati* estas bati.

Se la lasta vorto estas substantiv-kategorio aŭ adjektiv-kategorio, ĝi donas al la antaŭa vorto signifon substantivan; ekz-e: *varmruĝa* = ruĝa pro varmo; *prespreta* = preta por preso; *aminda* = inda je amo.

Se la lasta vorto estas verbo-kategorio, la antaŭa vorto ricevas aŭ signifon adjektivan (ekz-e: *ruĝpentri* = pentri ruĝa; *sanigi* = igi sana), aŭ signifon adverban (ekz-e: *martelbati* = bati martele (per martelo); *bonfarti* = bone farti).

En tiu speco de kunmetaĵoj la finaĵoj estas interŝanĝeblaj kaj aldonas sian signifon en la sama maniero kiel en la unuradikaj vortoj; ekz-e: *vaporŝipo, vaporŝipa kompanio* (same kiel: ŝipo, ŝipa); *martelbati, martelbato, martelbate*.

§ 5.– En alia aparta speco de kunmetaĵoj – ne kompreneblaj laŭ la antaŭa paragrafo – la finaĵo mem estas la ĉefa vorto kaj difinas la signifo-kategorion de la tuto; ĝi sekve ne estas interŝanĝebla kun alia finaĵo.

Se la radikoj de tia kunmetaĵo apartenas al la tri ĉefaj signifo-kategorioj, la unua ĝenerale havas, aŭ eventuale akiras, signifon de adjektivo, kaj la dua – de substantivo; ekz-e: *bluokula, grandkuraĝa, samidea* = karakterizita per blua okulo, per granda kuraĝo, per sama ideo.

Se la unua radikoj estas prepozicio aŭ numeralo, ĝi eventuale trudas substantivan signifon al la dua; ekz-e: *senutila* = kiu estas sen utilo; *triangulo* = tio, kio estas tri anguloj; *triangula* = karakterizita per tri anguloj.

Por formi derivaĵojn de tiuj kunmetaĵoj, oni estas devigata uzi sufiksojn; ekz-e: *bluokuleco, samideano, senutileco, trianguleco*.

RIM.: Esprimoj similaj al *blua okulo, bela reĝino, varma radio*, ... ne povas transformiĝi al samsignifaj kunmetaĵoj: ili devas resti ĝuste, kiel ili estas.

Aliparte, ekz-e: *belreĝino, varmradio*, ... povas signifi nur: *reĝino de la belo, radio de varmo*.

Fine ekzistas kelkaj apartaj (tute maloftaj) okazoj ne oponeblaj al la ĵusa paragrafo; ekz-e: *junedzino* signifas personon, kies edzineco estas juna.

§ 6.– En la konstruo de la vorto oni devas enkonduki ĉiujn elementojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas, por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan.

G. Waringhien,
Prezidanto de la Akademio.

D-ro A. Albault,
Direktoro de la Sekcio de la Ĝenerala Vortaro.

III. KOMUNIKAĴOJ
de la
AKADEMIO
al la gazetaro

La sekvantaj Komunikadoj estis senditaj al la ĉefaj Esperantaj gazetoj, por regule informi la publikon pri la agado de la Akademio. Ni dankas la gazetojn, kiuj bonvolis dediĉi iom el sia spaco al la reprodukto de tiuj Komunikadoj.

La Estraro.

1.

8. Novembro 1965

Je la komenciĝo de la tria jaro de mia prezidanteco mi opinias utila doni al la publiko, responde al pluraj diverslokaj deziresprimoj, mallongajn informojn pri la nuna agado de la Akademio.

La unua jaro (1963–1964) estis dediĉita al la revizio de la Statuto, al la interna reorganizo kaj al provoj starigi en la akademianaro pli justan reprezentadon de la diversaj lingvofamilioj.

En la dua jaro (1964–1965) la Akademio esploris du ĉefajn demandojn, kiuj jam de longe atendis ian solvon, tiun pri la uzado de la pasivaj participoj kaj tiun pri la gramatika kategoriado de la radikoj; pri ambaŭ estis jam atingitaj decidoj: pri la unua demando, la plimulto de la Akademio konstatis, ke la ekzemploj entenataj en la “Fundamento” ne povas esti klarigataj laŭ la tiel nomata “nete tempa sistemo” sen arbitra perforto de ilia senco; pri la dua demando, la plimulto konstatis, ke la Esperantaj radikoj havas unu gramatikan karakteron kaj ke la analizo de Saussure, kompletigita de Wüster kaj de Kalocsay, respondas al la realaĵoj de la lingvo.

La koncernaj Sekcioj (pri Gramatiko unuflanke, kaj pri la Ĝenerala Vortaro aliflanke) nun prilaboras la tekston de la definitivaj resolucioj pri tiuj du demandoj. La ceteraj Sekcioj, pri la Teknika Vortaro, la Bibliografio, la Prononcado kaj la Literaturo pretigas nun raportojn pri temoj poste esplorotaj de la Akademio.

La Prezidanto,
G. Waringhien.

2.

16. Marto 1967

La Akademio aprobis la ideon de starigo de “**Baza Radikaro Oficiala**”, kies celo estas aparte proponi la vulgaran aŭ lernolibran vortprovizon, tiel ke laŭeble “la vortaro de la lernolibroj fariĝu tute unueca, kaj ĉiu povu certe scii, kian vortkonon oni povas supozi ĉe iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro”.

Tiu baza Radikaro Oficiala estos ellaborita en la venontaj monatoj surbaze de projekto, kiu entenas proksimume 2.500 radikojn kaj elementojn, dividitajn en naŭ grupoj de ofteco: de la unua grupo de plej oftaj elementoj ĝis la naŭa kun relative malpli oftaj radikoj kaj elementoj.

La Prezidanto de la Akademio,
G. Waringhien.
La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,
A. Albault.

La Akademio alprenis jenajn decidojn:

§ 1.– La du formoj **kemio** kaj **mekaniko** estas tolerataj, kiel paralelaj formoj, apud la Fundamentaj **ĥemio** kaj **meĥaniko**. Kompense ambaŭ formoj **mekanismo** kaj **meĥanismo** estas rigardataj kiel egale bonaj.

§ 2.– a) Estas tolerata la nova ortografio **buĝeto** anstataŭ la ĝis nun oficiala **budĝeto**.

b) Estas tolerata la nun tre uzata formo **proleto**, kiel paralela formo al la internacia kaj oficiala **proletario**.

c) Apud la oficialaj substantivoj **federacio** (svisa federacio), **dekoracio** (teatra dekoracio), **konversacio** (ambasadora konversacio) estas tolerataj la pli simplaj verboj: **federi**, **dekori**, **konversi** (federi societojn, dekori domon, konversi inter amikoj).

ĉ) Apud la oficiala substantivo **revelacio** (dia revelacio) estas tolerata la pli simpla verbo **riveli** (riveli sekreton, talenton, foton...).

§ 3.– La vorto **koncentra** perdas sian oficialecon: ĝian signifon oni jam de longe esprimas per: **samcentra**. Aliparte estas tolerata la verbo **koncentri** en la signifoj: “kunveniĝi en centron, maldilui”.

La Prezidanto de la Akademio,

G. Waringhien.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,

A. Albault.

Noto. Pro akcidento en la franca poŝtofico, tiu ĉi komunikajo ne atingis la adresulojn, kies pardonon ni petas. G.W.

25. Novembro 1967

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) “solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof”, kaj de la unuanima komitato de UEA “kiel eble plej baldaŭ” difini tiun solvon;

samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, komerca, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. **“Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970” = do la garantiantoj estos kvitaj,**
 - A) **se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;**
 - B) **nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.**
2. **“Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo” =**
 - A) **la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;**
 - B) **la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.**
3. **“Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon” =**
 - A) **la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto;**
 - B) **la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.**
4. **“Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio” =**
 - A) **oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;**
 - B) **oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.**

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉi-suprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

G. Waringhien	<i>Prezidanto,</i>
P. Neergaard	} <i>Vicprezidantoj,</i>
A. D. Atanasov	
R. Bernard	<i>Sekretario,</i>
D. B. Gregor	<i>Direktoro de la Gramatika Sekcio.</i>

Noto. Ĉi tie devus troviĝi la komunikaĵo entenanta la “Rekomendojn pri la Vortfarado”. Sed ties teksto estas, laŭ nia opinio, tro longa por povi esti facile publikigita en ordinaraj gazetoj, kaj tro delikatnuanca por povi esti ĝuste resumita. Tial ni preferas simple peti la interesatojn, kaj precipe la aŭtorojn de duagradaj lernolibroj, sin turni al la plena teksto (vidu p. 58).

G.W., A.A.

TABELO de ENHAVO

ANTAŬPAROLO.....	3
ADMINISTRACIA PARTO.....	5
1. Mallonga historio de la Lingvaj Institucioj	7
2. Statuto de la Akademio de Esperanto	11
3. Akademio de Esperanto	15
Estraro.....	15
Sekcioj.....	15
Listo de la Akademianoj.....	16
laŭ alfabeto ordo.....	16
laŭ la lingvoj.....	18
laŭ la jaroj.....	19
Memorpaĝo.....	20
LINGVA PARTO.....	21
I. Enketo kaj decidoj pri la Pasivaj Participoj	22
1. Motivoj de tiu enketo (Cirk. 76).....	23
2. Demandaro pri la uzado de la participoj en la Fundamento.....	24
3. Prokrastigo de la templimo de voĉdono (Cirk. 77).....	31
4. Alvoko al sereneco (Ald. A).....	32
5. Refuto de kelkaj objetoj (Ald. B).....	33
6. Rezulto de la voĉdono.....	35
7. Raporto de la Direktoro de la Gramatika Sekcio.....	36
(Cirk. 82) Proponita Rezolucio.....	37
8. Rezultoj de la voĉdono (Cirk. 84).....	38
9. Raporto de la Estraro pri konsulto farita de landaj asocioj (Cirk. 90).....	39
10. Rezultoj de la voĉdono (Cirk. 91).....	43
11. Pri la fundamenteco de la Ekzercaro (Ald. A).....	45
II. Enketo kaj decidoj pri la Vortfarado	46
Historio de la voĉdonoj tiutemaj.....	47
I. Raporto de la Direktoro por la Ĝenerala Vortaro.....	49
II. Konstatoj de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.....	52
III. Rekomendoj de la Akademio.....	58
III. Komunikaĵoj al la gazetaro	60
1. Pri la laboro farita ĝis 1965.....	61
2. Pri la “Baza Radikaro Oficiala”.....	61
3. Pri la forma aŭ senca modifo de kelkaj oficialaj vortoj.....	62
4. Pri la pasivaj participoj.....	63
TABELO DE ENHAVO.....	64